


# EL POPOLA ĈINIO

中國報道 1979 5




# JON- AJ- VIR- R- AJ- Z- AJ- C

Sciencaj laborantinoj  
faras eksperimenton  
pri varma emisio de  
grandskala integra  
cirkvito.









Komunumaninoj en Turpan de Xinjiang ĝoje rikoltas vinberojn.





Fame konata filma aktorino Bai Yang (meze), kaj fame konataj aktorinoj de Shaoxing-opero Yuan Xuefen (maldekstre) kaj Jin Caifeng (dekstre)

Pentristino Ding Yunqing en pentrado





Xinjiang-a ujugura kan-  
tistino Jiamila

Chen Xiaoxia, çampio-  
no de virina plonço en  
la 8-a Azia Sporta  
Konkurso






# Lanterna metiisto Ren Yiting



Ren Yiting en laboro

Lanterna kunveno estas speco de tradiciaj popularaj kulturaj aktivadoj de Ĉinio. Okaze de tradiciaj festoj, diverskoloraj belaj lanternoj plidensigas la festan atmosferon. En la kuranta jaro oni aranĝis grandiozan Lanternan Kunvenon de Okcidenta Lago en Hangzhou kaj iuj brilkoloraj lanternoj en versimilaj formoj allogis multajn vizitantojn. La farinto de tiuj lanternoj estas maljuna metiisto Ren Yiting de Xiashi-gubernio de Zhejiang-provinco.

La 75-jara artisto havas historion de 62 jaroj en farado de lanternoj. En la malnova socio malalta estis la socia pozicio de lanterna metiistoj. Post la Liberigo la registaro invitis ilin labori en la Metiarta Instituto de Zhejiang-provinco, kreante por ili bonajn laborkondiĉojn. Dank' al tio senĉese leviĝis la arta nivelo de Ren Yiting. La strukturo de liaj lanternoj estas mirinda kaj farado delikata. Li heredis tradiciajn artajn teknikojn kaj kreis novon en koloroj, brileco kaj formoj. Liaj lanternoj estas multe ŝatataj de la amasoj, kaj multaj el ili estas donacitaj de la registaro al fremdlandaj gastoj kaj senditaj eksterlanden por ekspozado.



Lanterno kun pentraĵo "Chang'e Flugas al la Luno"



Orfiŝa lanterno


Ren Yiting kune kun teknikistoj diskutas pri projektado de lanternoj.








Delikata penda lanterno  
farita el ruĝa ligno



Ren Yiting kaj lia metilernantino





Lotusfloraj lanternoj



En la Lanterna  
Kunveno de Ok-  
cidenta Lago



# EL POPOLA ĈINIO

中國報道

1979

N-ro 5

(248)

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO

P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio


Ĝenerala distribuanto: Guozi Shudian P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

## Sur la Kovrilo:

P. 1 En libera tago


P. 4 Pejzaĝo de Xishuangbanna  
en Yunnan-provinco

(laka pentraĵo de Zhu Yaokui)



## Enhavo

Pri la Kultivejo de Komunisma Junularo . . . . .	2
Agronomia eksperimentado en Huarong . . . . .	8
Gezhouba-hidroelektrajo en konstruado . . . . .	13
Ladmanĝaĵoj de marko "Xiangshan" . . . . .	15
Optika inĝeniero Lai Aiguang . . . . .	18
Vivo de muzikisto . . . . .	21
Verda Majo en Ĉinio (daŭrigo) . . . . .	24
TRA ĈINIO: Pri la ok pitoreskejoj de Taiwan . . . . .	28
La Ĉina trezora insulo Taiwan . . . . .	33
La loko de amo en la vivo (daŭrigo) . . . . .	35
AMIKECO: De la "monda firsto" al la norda angulo de la terглоbo . . . . .	39
EL ĈINA MODERNA HISTORIO: La Movado de la Kvara de Majo . . . . .	42
KALEJDOSKOPO: Kiu estas mastro de la domo . . . . .	48
Nigrakola gruo . . . . .	49
Divenado pri pilkoj . . . . .	49
ESP-NOVAĴOJ: Fama ĉina esperantisto Venlo Fon forpasis . . . . .	50
Fremdlandaj Esperantaj kantoj en Ĉinio . . . . .	50
KURANTAJ AFEROJ . . . . .	51
La "Xi'an-a Evento" surscenigita . . . . .	53



# PRI LA KULTIVEJO DE KOMUNISMA JUNULARO

de NIA RAPORTISTO

**L**A nomita kultivejo sin trovas sur la bordo de Boyang-lago en Jiangxi-provinco (Gianghi). Kiam mi vizitis ĝin, estis frosta vintro, tamen mi vidis tie varmajn scenojn.

## POR KONSTRUI NOVAN VIVON


Mi estis loĝigita en la dua etaĝo de la kultiveja hotelo. Mi ĉirkaŭrigardis de sur ĝia vasta balkono kaj la tuta kultivejo tuj falis en miajn okulojn: Proksime antaŭ la hotelo kuŝas larĝa vojo, ambaŭflanke de kiu staras oficejo, fabriko, lernejo, hospitalo, magazenoj kaj loĝdomoj de la kultivejo; fore du montetoj etendiĝas de nord-okcidento al la lagobordo; inter la montetoj serpentumas rivereto, ambaŭborde de kiu sterniĝas ebenaj rizkampoj, kaj en ĝia malsupra baseno digo baras la lagakvon. La sekretario de la Komunisma Junulara Ligo de la kultivejo diris al mi, ke tie troviĝas ĉiuj 180 hektaroj da rizkampoj de la kultivejo kaj la meznombra hektara produktokvanto de rizo atingis 10,500 kilogramojn. Sed antaŭe tie estis fragmitejo frekventata de sovaĝaj bestoj! Chen Guoxiang, tiama

membro de la Ligo diris al mi, ke antaŭ pli ol 20 jaroj, kiam ili venis de Shanghai (Ŝanhajo) al tiu loko, tie estis tre dezerte. En pluva sezono formiĝis inter la du montetoj vasta akvejo pro retrofluo de la rivero puŝata de la lagakvo, dum sekeca sezono la fragmitejo ambaŭflanke de la rivero fariĝis denove loko frekventata de vulpoj kaj lupoj pro retiriĝo de la lagakvo kaj malleviĝo de la riverakvo.

“Kial do vi venis al tiu senhoma dezertejo?” mi demandis.

“Por subteni la socialisman konstruadon de Jiangxi!” diris Chen Guoxiang kun rideto. “Frue en la kvindekaj jaroj la Shanghai-a Komitato de la Komunisma Junulara Ligo alvokis, ke membroj de KJL kaj junuloj iru al Jiangxi por subteni la socialisman konstruadon. Respondante la alvokon vastaj amasoj de junuloj konkure sin anoncis por iri. Sed ne ĉiuj estis permesitaj por veni ĉi tien. Ni gejunuloj, kiuj ricevis la permeson, ĝoje forlasis Shanghai kaj venis ĉi tien, tenante ruĝan flagon donitan de la urba komitato de KJL.”





*Administrejo de la Kultivejo de Komunisma Junularo*

Englutinte buŝon da teo, Chen Guoxiang diris, ke tiam neniu kabano troviĝis en la loko. Sed ĉiuj estis sentimaj kaj havis ardan entuziasmon. Ili mem konstruis domojn el arbotrunkoj, ekspluatis virgan teron per ŝpatoj kaj starigis digon. En laborpaŭzo ili eĉ sin amuzis per kantoj. Tiam la unua sekretario de la Centra Komitato de KJL Kamarado Hu Yaobang venis vidi ilin. Li kore kuraĝigis ilin bone konstrui la socialisman patrolandon kiel bonaj gefiloj de la Partio. Ĉe adiaŭo li manskribis por la kultivejo la vortojn “Komunumo de Komunisma Junularo”. En la pasintaj pli ol 20 jaroj, ili venkis multajn malfacilojn, kreis milojn da muoj (15 muoj = 1 hektaro) da kampoj, konstruis domojn, starigis agronomian instituton, agrikulturilan stacion, aŭtotaĉmenton kaj ankaŭ fondis prilaborejon de lanugoj kaj salitaj anasoj, maŝinriparejon, vinfarejon kaj elektrejon. La totala produktovaloro de industrio konsistigis pli ol 95% de tiu de la tuta kultivejo. De 1970, krom semoj, furaĝo, grenoj bezonataj de la laboristoj kaj oficistoj de la kultivejo kaj salajroj, ili liveris al la ŝtato 7,220,000 juanojn da profito kaj 2,650,000 kilogramojn da greno.

Aŭskultinte la rakonton de Chen kaj rigardante la fabriksdomojn ekster la fenestroj mi eksentis estimon al tiu veterana membro de KJL. Tamen mi ne sciis kiel oni daŭrigas la kreitan aferon. Mi demandis: “Ĉu ankoraŭ venis aliaj junuloj post vi?” “Jes,” diris Chen. “Preskaŭ ĉiujare venis intelektaj gejunuloj. Nun en la tuta kultivejo estas 1,800 laboristoj kaj oficistoj, inter kiuj troviĝas pli ol 800 membroj de KJL kaj gejunuloj. Nun ili ludas ankoraŭ pli gravan rolon en la nova longa marŝo.”

## **SUR LA VOJO DE LA NOVA LONGA MARŜO**

La sekretario de la komitato de KJL iris kun mi por pririgardi la kultivejon. Sur la muro ekster la pordo de la kultiveja administracio vidiĝis okulfrapaj vortoj: “Kiuj el ni estas veraj herooj? Ni vidu en la longa marŝo.” Mi atente pririgardis kaj trovis sube subskribon de 32 nomoj. La akompananto diris, ke tio estas honora nomlisto de sturmantoj en la nova longa marŝo en 1978.

En Ĉinio oni nomas nova longa marŝo la strebadon por efektiviigi la modernigon de agrikulturo, industrio, nacidefendo, tekniko kaj scienco en la fino de la kuranta jarcento. Ankaŭ la kultivejo havas sian propran celajon kaj disvolvis aktivadon de sturmantoj de la nova longa marŝo. Tio multe stimulis la gejunulojn. En 1978, ĉiuj unuoj de la kultivejo elektis siajn avangardajn laborantojn, inter kiuj aperis, post teknika ekzameno, 32 elstaraj junuloj-sturmantoj.

Ni venis en la prilaborejon de lanugoj kaj vidis, ke junulinoj laboris ĉe kudromaŝinoj. Kiam iu junulino salutis nin, mia akompananto ŝin prezentis al mi: “Ŝi estas sturmantino en kudrado de lanugajoj, nomata Song Guanglun. Ŝi estas tre lerta tiel en projektado, kiel en tajlado kaj kudrado.”

“Ne fanfaronu, ja longan vojon mi devas iri por atingi aliajn!” honteme diris malgranda Song kaj elprenis el la ŝranko specimenojn de iliaj produktaĵoj: kapkuseno, veŝto, jako, litkovrilo, dormsako k. a. Preninte la veŝton, la sekretario diris: “Ĝi estas la plej frue projektita kaj farita de malgranda Song. Apenaŭ ĝi estis vidita de fremdlandaj komercistoj en la foiro de Guang-



*Preparo por printempa plugado*

zhou (Kantono), ĝi estis laŭdata kaj mendita de ili. De tiam pli kaj pli grandiĝas la kvanto de menditaj varoj. En la pasinta jaro, vendiĝis 270,000 pecoj de pli ol 20 normoj kun valoro de 7,000,000 juanoj. La specimenoj de la menditaj varoj ĉiuj estis tajlitaj kaj kudritaj de malgranda Song kaj iuj el ili eĉ estis projektitaj de ŝi.”

Elirinte el la prilaborejo ni pririgardis kompletan ekipaĵon por klasifiki, lavi kaj sekigi plumojn. Kiam ni venis en la maŝinriparejon, la akompananto diris montrante junulon, kiu direktis arganon en muntado de ekipaĵoj: “Tiu ekipaĵo por prilabori plumojn estas fabrikita sub la gvido de tiu kamarado Xu Fugen. Ili multe altigis la laborefikon. Kaj novaj ekipaĵoj nun fabrikataj plialtigos la prilaboran kapablon.”

En laborpaŭzo mi intervjuis Xu Fugen. Sur lia tablo troviĝis libroj pri maŝinfarado kaj elektroniko kiel ekzemple “Transistoraj Saltaj Circuitoj”, “Elektronika Principo de Simpla Ciferregado de Torniloj”, “Komputeroj por Industria Regado”, “Strukturo kaj Apliko de Industriaj Mekanikaj Homoj” k. a. Rigardante tiun junulon mi demandis: “Ĉu ili estas kompreneblaj por vi?” Li respondis kun rideto: “La tasko de modernigo postulas, ke ni lernu, kaj mi legas unue la facilajn kaj poste malfacilajn.” Li diris al mi, ke li planas fari aŭtomatan kontrolilon por aŭtomatigi la prilaboradon de plumoj.

En la nomita kultivejo ja ne mankas gejunuloj energiplenaj kiel Song Guanglun kaj Xu Fugen.

En la fabrikoj kaj filiaj kultivejoj, mi proprakule vidis kaj propaorele aŭdis aferojn pri multaj junuloj, kiuj diligente studas kaj kuraĝas krei novajn. Iuj el ili estas avangardaj laborantoj en sia unuo kaj aliaj estas sturmantoj de la tuta kultivejo.

## FELIĈA FAMILIO

En la kultivejo la gejunuloj diligente laboras kaj ankaŭ fondis feliĉajn familiojn. Mi havis ŝancon por propaokule vidi naskiĝon de tia familio.

Iun posttagmezon la sekretario ĝoje diris al mi: “Mi informu al vi ĝojindan novaĵon: En la filia kultivejo okazos geedziĝa ceremonio de juna paro, ni iru ĉeesti.”

Kompreneble mi iris kun plezuro. Kiam ni venis en la salonon de la filia kultivejo, ni vidis, ke sur longa tablo metiĝis tetrinkilaro, bombonoj, cigaredoj k. a. La juna paro ĉirkaŭata de siaj gekolegoj enpuŝiĝis en la ĉambron kaj ilin sekvis famiilestroj kaj parencoj de ambaŭ flankoj. Sekretario Cai de la partia filio de la filia kultivejo prezentis la junan paron: “Jen la novedzo Zhou Devei, 27-jara, membro de la kultivejo ekde 1975. Jen la novedzino Xu Haitao, 24-jara, membro de la kultivejo ekde 1977.” Mi gratulis ilin. Informiĝinte ke mi venis de Beijing (Pekino) ili sentis grandan ĝojon.



La geedzoj riverencis al la gastoj kaj gepatroj por esprimi sian dankon. Iuj el la ĉeestantoj faris gratulajn parolojn. Fine oni venis en gaja atmosfero en ilian domon.

La novaj geedzoj ricevis, de la kultivejo, litĉambron kun plankareo de ĉirkaŭ 16 kvadrataj metroj kaj kuirejon kun plankareo de 7-8 kvadrataj metroj. En la litĉambro ĉiuj mebloj, kiel ekzemple lito, vestokesto, ŝranko, tablo kaj seĝoj estas novaj; ankaŭ litajoj kaj trinkilaro estas nove aĉetitaj; la ĉambro aspektas aparte bela.

Mi petis ilin rakonti pri sia enamiĝo. La novedzo ekrigardis la edzinon kaj ekparolis nur post longa paŭzo pro hontemo: "Estas nenio menciinda." Tamen li fine plenumis mian peton sub mia insistado. La novedzo laboras en la tria taĉmento, la novedzino en la unua kaj ili antaŭe ne konis unu la alian. La hejmo de amiko de malgranda Zhou estas en la unua taĉmento. Ĉar li ofte vizitis lian hejmon, li konatiĝis tie kun malgranda Xu. Post multfoja kontakto ili sciis, ke ili ambaŭ decidis labori tie dum la tuta vivo, kaj enamiĝis. En la pasinta jaro, la patrino de Zhou enhospitaliĝis pro malsano kaj malgranda Xu ofte iris vidi kaj flegi

ŝin. — Tiamaniere ilia amo ĉiam pli profundigis kaj fine ili fariĝis feliĉa paro.

Mi demandis, kian planon ili havas por la estonto. Malgranda Zhou diris, ke ili ambaŭ estas ankoraŭ junaj kaj ne volas tuj havi infanon, ili unue akumulos iom da mono por aĉeti televidilon kaj studos televidan kurson.

Ĝuste tiam frato de Zhou invitis nin al tablo en alia ĉambro. Sur la tablo metiĝis multaj pladoj. Mi demandis la mastron, kiom da doto estis donita. La frato de malgranda Zhou diris, ke la laborantoj en la kultivejo venas de 16 provincoj kaj urboj de la tuta lando kaj ordinare ne multe zorgas pri doto, jam sufiĉas kelkaj novaj vestoj donacitaj de la novedzo al la novedzino. Ĉe tio alvenis la novaj geedzoj kaj ĉiuj tostis pro ilia feliĉo.

Same kiel malgrandaj Zhou kaj Xu, plejparto de la intelektaj gejunuloj de la kultivejo ekamis tiun lokon post laborado de kelkaj jaroj kaj formis feliĉajn familiojn unu post alia.

## ANTAŬ ADIAŬO AL LA KULTIVEJO

Antaŭ la fino de mia vizito al la kultivejo, alvenis la ĉina lunkalendaro novjaro — la Prin-



*Juna sturmento de la metalaja laborejo*



*Ĉampana preparejo*

tempa Festo. Okaze de la festo la oficejoj, lernejoj, fabrikoj kaj trupoj de la tuta Ĉinio havas feriojn.

Laŭ la loka kutimo, antaŭvespere de la Printempa Festo ĉiuj familianoj kunestas por kune preni abundan vespermanĝon kaj poste eksplodigas petardojn.

Yu Shiguan, sekretario de la Partia Komitato de la kultivejo invitis min al sia hejmo por ĉeesti festan kunmanĝon de lia familio. Li estas unu el la fondintoj de la kultivejo kaj lia familio konsistas el 7 membroj. Lia edzino estas lerta

en kuirado. Ŝi preparis por la festo multajn bongustajn pladojn. Ni ĉiuj tre ĝojis la favoron de la mastrino kaj tostis pro nia hodiaŭa feliĉa vivo. Bofranjo Yu diris al mi, ke antaŭ la Liberiĝo ŝia patro sin kaŝis ekstere en antaŭvespero de la Printempa Festo por eviti repagon de ŝuldo al bienulo kaj fine estis devigita forfuĝi aliloken. Maljuna Yu diris al mi, ke por la laboristoj kaj oficistoj senpagaj estas filmrigardado, banado, kuracado, uzo de tubokonduka akvo kaj veturado al la gubernia urbo. Plejparto de la familioj havas sian propran legomĝardenon, bredas kokojn, anasojn kaj





*La familio de Yu Shiguan*



porkojn. Kvankam ilia salajro ne estas alta, tamen nemalmultaj familioj aĉetis televidilon kaj vivas sufiĉe bone. Ni drinkis kaj babiladis ĝis profunda nokto.

Krakado de petardoj vekis min el la sonĝo — la lunkalendara novjaro jam komenciĝis. Mi eliris el la hotelo kaj vidis, ke infanoj ĝoje eksplodigas petardojn, sur la pordo de ĉiu domo gluiĝas ruĝaj paperslipoj kun versoparo kaj aro da gejunuloj intervizitas por esprimi novjarajn bondezirojn unu al alia.

En la hejmo de vicsekretario de la Partia Komitato de la kultivejo Jiang Zhongping, mi demandis lin pri la perspektivo de la kultivejo. Li diris, ke ili lernos de avangardaj landoj, plenenergie disvolvos prilaboran industrion de agrikulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj. En 1985 la produktovaloro de la kultivejo atingos centmilionojn da juanoj. Ja ĝojiga plano! Mi deziras al ili sukceson. Sekretario Jiang diris kun rideto: “Tiam ni regalos la gastojn per laktoproduktaĵoj kaj kukoj. Ni esperas, ke vi venos al ni denove.”

*Produktaĵoj de la kultivejo*



# Agronomia Eksperimentado en Huarong

**E**N 1956, dum la periodo de agrikultura kooperigo, He Guangxing, ordinara emancipita kamparano en Centra Ĉinio, akiris bonan rikolton dank' al apliko de bona semo kaj progresinta kultiva metodo. Sur la de li kulturitaj kvardek muoj (1 hektaro=15 muoj) da rizkampoj, la mua produktokvanto de rizo atingis 400 kg.. Por laŭdi kaj stimuli lin en scienca terkultivado, la popola registaro invitis lin al la Tutlanda Kunveno de Labor-modeloj kaj premiis lin per bubalo. Tiu ĝojiga informo tuj disvastiĝis en lia hejmloko — la kamparo de la gubernio Huarong de la provinco Hunan.

Frue en printempo ĉijare, mi, kiel raportisto, vizitis Huarong. Tie amasa scienca esplorado vige disvolviĝas kun la agronomia eksperimenta reto de gubernio, komunumo, produkta brigado kaj produkta taĉmento kiel la centro.

## NAŬ GRAJNOJ DA SEMO

Atinginte la gubernion Huarong, mi deziris intervjui unue He Guangxing. Tamen mi ne trovis lin, ĉar li foriris por ĉeesti la Scienc-teknikan Kunvenon de la subprovinco Yueyang. Do mi unue vizitis la agronomian grupon de la tria produkta taĉmento de la Wuxing-a Produkta Brigado de Hucheng-popolkomunumo. Tiu grupo estas la unua agronomia esplora organizo de la gubernio kaj sidas kvin kilometrojn for de la gubernia urbo. Sur la muroj de la sidejo de la grupo estas multaj honoraj flagoj, honoraj

*Eksperimenta bazo de bonaj semoj*





paperoj, diversaj eksperimentaj donitajoj kaj grafikoj. Montrante unu el la honoraj paperoj grupestro Xiao Bingyan informis min, ke ĝin propramane donis Kamarado Hua Guofeng en la spertointerŝanĝa kunveno de Hunan pri lerno de Dazhai en agrikulturo en la jaro 1973.

Inspirite de scienca terkultivado de He Guangxing en la antaŭaj jaroj, Xiao Bingyan faris eksperimenton pri hibridigo de du malsamaj specioj de rizo ekde 1963. Tiujare li rikoltis naŭ grajnoj da semo. La sekvintan jaron li semis ilin en sia legomĝardeno. Dank' al zorge ma flegado la hibridigita rizo donis tre bonan rikolton. Tio pliigis lian fidon pri scienca esplorado. Printempe de 1965 li kaj kvar komunumanoj formis scienc-eksperimentan grupon. Ili faris komparan eksperimenton pri nova kaj indiĝena specioj sur iu parcelo. Ĉiutage Xiao Bingyan kaj liaj kolegoj kaŭris tie por observa-

do, flegado kaj registrado, kelkiam eĉ en vento kaj pluvo. Nelonge poste, la rizplantoj maturiĝis kaj la rikolto montris, ke la novspecia rizo produktis pli-ol-duoble kiom la indiĝena. Tiu granda atingo stimulis ilin kaj liberigis la penson de la samlokanoj. La grupo daŭrigis sian eksperimentadon kaj liveris sufiĉe da bona semo al la produkta taĉmento. Dank' al la semo kaj apliko de aliaj pliproduktigaj rimedoj, la meznombra mua produktokvanto de greno de tiu taĉmento superis 800 kg. en la lastaj tri jaroj.

Huarong ĉe Dongting-lago estas grena produk-tejo kun fekundaj kampoj, varmeta klimato kaj sufiĉa precipitaĵo. Tamen antaŭ la Liberiĝo la meznombra mua produktokvanto de greno en la gubernio estis nur ĉ. 100 kg. Post la Liberiĝo, la kamparanoj kolektiviĝintaj paŝ-post-paŝe aplikis sciencon al terkultivado, plenforte kulturis bonajn speciojn kaj alprenis aliajn plipro-

*Elkulturo de nova specio de rizo*



duktigajn rimedojn. Por enkonduki, generi kaj plivastigi la bonajn speciojn de frua kaj malfrua rizo nun ĝenerale aplikatajn en la gubernio oni uzis ĉ. 3 jarojn dum en la pasinteco 5-6 jaroj estis bezonataj por ĝeneraligi novan specion. Krom enkonduko, tiu gubernio mem elkulturis 17 novajn speciojn de rizo. En la pasintaj sep jaroj la gubernio Huarong jam liveris al aliaj lokoj 37,500 tunojn da bona semo de rizo kaj 850 tunojn da bona semo de kotono. Ekde 1975 sur ĝiaj 580,000 muoj da rizkampoj la meznombra mua produktokvanto superis 500 kg.

## AMI KAJ APLIKI SCIENCON

En Huarong, aplikinte sciencojn al terkultivado, oni pliproduktis grenon, kaj ankaŭ kulturis grandan nombron da laborantoj kun agronomia scio.

En la pasinteco komunumanoj el malsamaj vilaĝoj babilis nur pri bagateloj kiam ili renkontiĝis. Nun la ĉefa temo de ilia konversacio estas kiel praktiki modernan teknikon por direkti la agrikulturan produktadon kaj serĉi altpro-

*Fiŝkaptado*





duktigan vojon. Maljuna Yang, ĉefo de la oficejo de la agronomia eksperimenta reto de tiu gubernio informis min, ke nun oni fondis ses guberniajn agronomiajn esplorojn, 23 polkomunumajn agronomiajn staciojn, 407 produktbrigadajn agronomiajn taĉmentojn kaj 3,698 produktotaĉmentajn agronomiajn grupojn. 100,000 muoj da kampoj estas difinitaj kiel agronomi-esploraj bazlokoj. Multaj kadroj kaj komunumanoj, inkluzive de junuloj, veteranaj kamparanoj, virinoj kaj lernantoj, ĉiujare aktive partoprenas en scienca esplorado sur alt-produktaj kampoj, eksperimentaj kampoj kaj bonspeciaj kampoj.

Por altigi la agronomian kaj teknikan nivelon de la kadroj kaj komunumanoj, diversaj organizoj de la agronomia eksperimenta reto de tiu gubernio respektive fondis agronomiajn lernejojn kaj agrikulturajn teknikajn kursojn. Teknika ekzameno kaj ekspertizado en 1978 pruvis, ke en la gubernio estas pli ol 23,000 kvalifikitaj kamparanoj-teknikistoj kun sufiĉe da fakaj scioj kaj sendependa laborkapablo. Ili estas ĉefa forto en apliko de scienco kaj tekniko al agrikultura produktado. Yin Jingzhi de Xinhe-komunumo diligente studas agrikulturan teknikon dum multaj jaroj. Li legis pli ol tricent sciencajn kaj teknikajn librojn pri grundologio, genetiko k.s.. En la pasinteco la fruaj rizplantidoj en tiu gubernio ofte putriĝis pro frosta aerofluo, kaj en 1966 eĉ pli ol 4,500,000 kg. da rizsemo perdiĝis en tio. Por malpliigi tian perdon, Yin Jingzhi kaj lia agronomia taĉmento decidis venki tiun malfacilon. Post multfoja eksperimentado ili finfine trovis solvon, nome kulturi rizplantidojn en forcejo kaj transplanti ilin kun grundo. Per tiu metodo oni povas ne nur eviti putriĝon, sed ankaŭ ŝpari 6.5 kg. da bona semo en ĉiu muo. En la scienc-teknika kunveno de la gubernio okazigita en la lasta decembro, Yin Jingzhi ricevis la titolon de unuaklasa kamparano-teknikisto kaj materian premion.

Nemalmultaj kamparanoj-teknikistoj en produktaj brigadoj kia Yin Jingzhi respondecas pri plantado, semo, vegetaja protektado, grundo, sterko kaj meteo, kaj plene praktikas sian fakan scion en produktado. Pasintece tiu gubernio serioze suferis de plantmalsanoj kaj fiin-



*Eksperimento pri intermiksa kulturado de plantoj*



*Scienca grupo ekzamenas rizon post fekundigo.*

sektoj. Direktate de diversnivelaĵoj prognozaj organizoj pri plantmalsanaj kaj fiinsektaj damaĝoj, la vegetaj-protektistoj longtempe persistas en eksperimentado kaj esploro pri prevento, ekstermo kaj prognozo de plant-malsanoj kaj fiinsektaj. Ĉiuvintre, ili faras preventon kaj ekstermon en kampoj malgraŭ frostoj, kaj ekzamenas kaj desinfektas la rikoltitajn plantaĵojn kaj semojn. La damaĝ-kvanto de riz-piralido, la plej danĝera fiinsekto tie, jam estas malpli ol 1.5%.

Kampanoj-teknikistoj pri grundo kaj sterko ĝenerale ekzamenis la grundon de la gubernio kaj elmetis proponojn por plibonigi ĝin. Sole en vintro kaj printempo de 1975, tri mil el ili kun komunumanoj faris ĝeneralan ekzamenon al pli ol 40,000 hektaroj da agroj, t.e. 82% de la totala areo de agroj de la gubernio, kaj akiris grandan nombron da donitaĵoj, analizis la kvanton de nitrogeno, fosforo, kalio kaj aliaj elementoj en la grundo kaj elmetis sciencajn projektojn por altigi la fekundecon. Ili prenis ankaŭ efikajn rimedojn por plibonigi la agrojn ĉe lagoj kun alta subtera akvonivelo kaj en montetoj kun maldika tertavolo.

Plenuminte la propran sciencajn terkultivadon, la gubernio Huarong sendis pli ol 900 kampanojn-teknikistojn al 32 gubernioj de ok provincoj kaj municipoj por popularigi agrikulturan teknikon, kaj iuj el ili jam fariĝis agronomoj.

## HE GUANGXING KAJ LIA EKSPERIMENTA KAMPO

Post kelkaj tagoj He Guangxing revenis de la kunveno. Iuvespere mi vizitis lin. Tiam li disputis kun kolegoj pri eksperimenta kampo.

En 1978 He Guangxing kulturis 2.8 muojn da eksperimenta kampo kaj la mua produktokvanto atingis 1,557 kg. Tio estis relative alta en la lando. Tamen li ne kontentiĝis pri tio. Li opiniis, ke kvankam la hektara produktokvanto de greno en la gubernio altiĝis 6-oble kompare kun tiu de la komenca periodo post la Liberiĝo dank' al scienca terkultivado, tamen ĝi kreskis nur je 1,500 kg. kompare kun tiu atingita de li en 1956, nome 6,000 kg. Por ke la agrikultura pro-

duktado de la tuta gubernio vere impetu, estas necese rapide popularigi la altproduktigan sperton pri lia eksperimenta kampo, alie, la alta produktokvanto de eksperimenta kampo ne havas gravan signifon.

Dum multaj jaroj, He Guangxing zorgas ne nur pri sia eksperimenta kampo, sed eĉ pli multe pri la grandarea riĉa rikolto de la tuta gubernio. En iu jaro li enkondukis novan specion de rizo karakterizatan per alta produktado. Tio interesis kampanojn de najbaraj brigadoj. Ili petis de li pli da tia semo. Tamen tiel multe li ne havis. Kion fari? Li interkonsiliĝis kun estroj de sia propra brigado kaj decidis planti la plantidojn unuope kaj tiel vastigi la bonspeciajn kampojn de 300 muoj al mil muoj.


Tio renkontis oponon de iuj komunumanoj, kiuj opiniis ke tio malpliigos la produktokvanton almenaŭ je 50 kg. por muo, kaj sekve je 50,000 kg. por mil muoj. Tamen He Guangxing ne tiel opiniis. Li faris detalan kalkulon al ili: Laŭ akirita sperto, sur mil muoj ili rikoltos almenaŭ 350,000 kg. da rizo. Krom 50,000 kg. bezonataj de ilia brigado kiel semo, ili povas provizi najbarajn brigadojn per ceteraj 300,000 kg. kiel bona semo por pli ol 20,000 muoj da kampoj, kiuj pliproduktos duonmilionon da kg., se ĉiu muo pliproduktos 25 kg. Tiel venontjare oni nete pliproduktos 450,000 kg., kompensinte ĉijaran malpliigon de 50,000 kg. Tio estos pli granda kontribuo al la ŝtato. Liaj vortoj konvinkis la oponantojn. Tiujare lia produkta brigado liveris 350,000 kg. da nova rizsemo al najbaraj komunumanoj kaj brigadoj.

Dum la pasintaj pli ol 20 jaroj He Guangxing ne nur antaŭiris en scienca terkultivado kaj serĉado de rimedoj por grenata altproduktado de la gubernio, sed ankaŭ starigis ekzemplon per sia alta politika konscio kaj komunisma stilo. Li diris: "Posedinte progresintan agrikulturan teknikon oni ankaŭ devas sin gvidi per progresinta penso. Ĉiuj scienc-esploraj atingoj devas aparteni al la tuta popolo. Hodiaŭ la tuta popolo klopodas por efektiviĝi modernigon de agrikulturo, industrio, nacidefendo kaj scienco kaj teknikoj. Ni, kampanoj, kompreneble devas fari nian propran kontribuon."



HUA WEN:

# Gezhouba- hidroelektrejo en Konstruado



*La hidroelektrejo en konstruado*


**S**UR la meza parto de Changjiang (Jangzi)-rivero staros granda hidroelektrejo.

La konstruata elektrejo nomata Gezhouba estas la unua akvoutiliga pivota konstruado sur la trunko de tiu rivero. Ĝi kuŝas proksime de Yichang de Hubei-provinco, ĉe la elirejo de Xiling-montgorĝo, je 3 kilometroj malsupre de Nanjinguan. Tuj post trapaso de Nanjinguan la rivero abrupte larĝiĝas de 300 ĝis 2,200 metroj kaj la fluo malrapidiĝas. Tie en la rivero troviĝas du insuletoj, nome Gezhouba kaj Xiba, kiuj tranĉas la riveron en tri branĉojn, nome la Grandan Riveron, la Duan Riveron kaj la Trian Riveron. Kaj ĝuste ĉe tiu loko la riverego estas barata kaj konstruiĝas la hidroelektrejo.

Lastatempe mi vizitis la konstruejon. En la domo, kie sidas la komandejo, mi estis interesita de modelo de la elektrejo elektre funkciigata. Montrante la modelon klarigisto diris, ke antaŭ la jaro 1985, sur la larĝa riversurfaco aperos barajo longa je pli ol 2,500 metroj kaj alta je 70

metroj kun tri kluzoj trapaseblaj por dekmil-tunaj ŝipoj pasaĝeraj kaj varaj, kaj por grandaj remorkaroj; malsamaj hidroturbinaj generatoraj kompletoj funkcios tie por liveri elektron al Hubei, okcidenta Henan, okcidenta Hunan kaj orienta Sichuan. Akvodrena kluzo kaj sabloforiga kluzo funkcios por elimini minacon de inundo al la malsupra baseno de Changjiang-rivero.

La konstruado estos plenumita en du periodoj. En la unua periodo oni faras konstruadon sur la Dua Rivero kaj la Tria Rivero, kaj malfermos la Grandan Riveron al trafiko; en la dua periodo oni faros konstruadon sur la Granda Rivero, kaj servigos la Duan kaj la Trian Riverojn al trafiko kaj produktado de elektro. La konstruado de la unua periodo inkluzivas du porŝipajn kluzojn kaj 6-pordan sabloforigan kluzon sur la Tria Rivero, 7-generatoran elektran centralon kun totala kapacito de 965,000 kilovatoj kaj 29-pordan akvodrenan kluzon sur



*La kluzo*


la Dua Rivero. En la unua periodo oni devas movi 62,000,000 kubmetrojn da tero kaj ŝtono kaj meti 6,200,000 kubmetrojn da betono. Nun pli ol duono de tiu laboro jam plenumiĝis. La ŝiptrapasaj kluzoj kaj sablo-foriga kluzo jam estas fundamente formitaj kaj komenciĝis konstruado de la centralo kaj akvodrena kluzo.

Mi venis al la konstruejo kaj vidis, ke la giganta barajo estas streĉe konstruata. Aŭtoj portantaj konstruajn materialojn kuras tien kaj reen; turgruoj turnadas siajn brakojn por meti betonon al difinitaj lokoj. Nokte fajreroj de elektra veldado pompe brilas kvazaŭ "arĝentaj floroj".

La konstruado de Gezhouba komenciĝis je la fino de 1970. Pro renkonto de teknikaj problemoj de sedimentado kaj erozio, la ĉefa konstruado ĉesis en 1972, kaj tie fondiĝis konstrua teknika komitato por solvi gravajn sciencajn kaj teknikajn problemojn en la konstruado. Teknikistoj de prospektorado, hidrologio kaj projektado zorge projektis bone kunlaborante kun laboristoj. Por akiri precizan donitajon oni faris dekojn kaj eĉ centojn da eksperimentoj por iuj projektoj. Ili invitis specialistojn de hidraŭliko kaj hidroelekto kaj profesorojn de diversaj lokoj de la tuta lando por kune esplori kaj interkonsiliĝi. Poste la konstruado de Gezhouba rekomenciĝis en oktobro de 1974.

Por frue finkonstrui la hidroelektojn, centoj da fabrikoj kaj entreprenoj de la tuta lando aktive donas siajn helpojn, kaj Hubei-provinco ĉiamaniere klopodas por liveri al la konstruado bezonatajn homfortojn kaj materialojn. Ĝia konstrua tasko de 1978 estis jam superplenumita.

*Panoramo de Gezhouba-hidroelekto*





KONG XIANGKAI:

# Ladmanĝaĵoj de marko “Xiangshan”



**L**A Nanning-a Ladmanĝaĵa Fabriko sin trovas ĉe la bordo de Yongjiang-rivero de Guangxi. Ĝi produktas ĉiujare pli ol 20,000 tunojn da diversaj ladmanĝaĵoj. Kiam ni enpaŝis en la fabrikon, ni vidis, ke ambaŭflanke de la vojo prospere kreskas mangarboj kaj fabriksdomoj elrigardas en verdajoj.

En la akceptejo la fabrikestro varme invitis nin gustumi ilian mandarinan sukcon de fama marko “Xiangshan”. Ĝi ricevis oran medalon en iu eksterlanda kunveno por juĝado de produktaj kvalito.


Kondukate de la mastro ni pririgardis pli ol 50 specojn de ladmanĝaĵoj produktitaj de la fabriko: de tomata marmelado en ladskatolo por 70 gramoj ĝis fruktosuko en ladskatolo por 3,000 gramoj zorge preparitaj kaj bele enladigitaj. Ankaŭ estas mandarina suko, sukerakva ananaso, anaso de Guangxi-a gusto k.a., kies

bela koloro, bona gusto kaj aromo lasis al ni profundan impreson.

## I

Guangxi situanta en suda Ĉinio abundas je fruktoj kaj legomoj pro milda kaj pluvoza klimato. En la komenco de sia fondiĝo la fabriko sendis grupon por enketi grundon, klimaton kaj krudajn materialojn en pli ol 40 gubernioj de Guangxi kaj rilatiĝis kun komunumoj kaj kultivejoj, kie multe produktiĝas fruktoj kaj prosperas brutobredado. Tiamaniere ĝi havigis al si 2,600 hektarojn da kampoj kiel bazon de krudaj materialoj, kiu povas liveri 80% de freŝaj manĝaĵoj bezonataj de la fabriko por enladigo.

Dum mia vizitado al la fabriko ĝia vicestrino Shen Yufen rakontis al mi pri provkulturado de



fungoj fare de ŝiaj kolegoj Fan Awu kaj Liu Tongmao.

Enladigita fungo estas supera speco de ladlegomo. Sed antaŭe oni neniam kulturis fungojn tiuloke. La fabriko taskis al la du kamaradoj kulturigi fungojn. En la komenco ili intencis uzi nigran grundon ĉirkaŭ la fabriko. Sed kemia analizo pruvis, ke ĝi estas neuzbla pro ĝia troacideco.

Ili iris serĉi neŭtralan grundon en loko je pli ol 30 kilometroj fore de la fabriko, sed ankaŭ tiea grundo ne estas ideala. Fine ili trovis efikan metodon post eksperimentado: kulturigi fungojn en grundo miksitita kun kalka akvo.

En la provkulturado ili tagnokte gardis en fungokreskejo por observi ŝanĝon de tiea klimato kaj atente akumuli donitaĵojn. Fine ili sukcesis elkulturi tre bongustan fungon. Post tio laboristoj kaj oficistoj de la fabriko iris al komunumoj kaj brigadoj por helpi kamparanojn en lernado de fungokultura tekniko.

En la sezono de produktado de ladfungoj en la pasinta jaro, iu japana amiko venis al la fabriko. Kiam li gustumis ladfungon, li tuj rapidis

al la laborejo por rigardi la prilaboradon de fungoj. Nun la ladfungoj en 850-gramaj porcioj produktitaj de tiu fabriko estas disvendataj pere de la kompanio de la japana amiko.

## II

En 1978 iuj ĉefaj jurnalaj raportistoj pri la Nanning-a Ladmanĝaja Fabriko, kiu klopodis por konservi la bonkvalitecon de sia renoma produktaĵo enladigita verda glavfazeolo de marko "Xiangshan". La sukceso de la fabriko estas atingita dank' al la scienca administra sistemo kaj bona prilabora teknologio.

Foje en tajda periodo de produktado de enladigita glavfazeolo, kontrolisto ekzamenis nombron da tiaj manĝaĵskatoloj kaj en iu el ili li trovis kelkajn pseŭdojunajn fazeolojn.

Ĉu estas tolereble lasi maljunajn fazeolojn miksiĝi en ladmanĝaĵon renoman en kaj ekster la lando! Tiam la fabrikestro tuj kun aliaj gvidantoj kaj teknikistoj iris al bazoj de materialoj. Post esploro oni konstatis, ke iuj fazeoloj, kiuj malrapide kreskis pro senpluveco kaj poste rapide kreskis post pluvo, aspektas junaj, tamen efektive jam malmoliĝis. La fabriko ĝustatempe

*Gvidanto de la fabriko en laborejo*



*La senpintiga laborejo*





alprenis rimedojn kaj forigis 30 tunojn da tiaj fazeoloj. Ĝuste dank' al tia zorga serioza laboro la ladfazeolo de marko "Xiangshan" ĉiam ĝuas renomon en kaj ekster la lando. Post rigardado al la fabriko iu nederlanda kliento ĝoje diris: "Hodiaŭ mi fine vidis la hejmlokon de la enladigita verda glavfazeolo de marko 'Xiangshan'."

Por altigi la kvaliton de la produktaĵoj, la nomita fabriko tre atentigas teknologian administradon kaj teknologigan studadon kaj serioze traktas ĉiujn laborprocedojn kiel ekzemple, temperaturon, tempon, dolĉecon, spicaĵojn kaj aldonaĵojn. Ĝi ne nur produktas ĉinajn tradiciajn ladmanĝaĵojn, sed ankaŭ enladigas kokon, anason, salamon kaj serpentan supon preparitajn laŭ la popola tradicia gastronomio de Guangxi. Lastatempe ĝi ankaŭ produktas novan ladmanĝaĵon kokajon stufitan kun valora drogo pseŭdo-ginsengo, kiu utilas por fortigi homan sanon.



### III

Ni en blankaj bluzoj venis en la helan kaj larĝan enladigan laborejon. En la materialo-

prilabora sekcio ni pririgardis maŝinon por detranĉi la ekstremojn de verdaj fazeoloj, kiu estis projektita kaj farita de la fabriko mem kaj premiita en la Tutlanda Scienca Konferenco. Vic-inĝeniero Hua Maozong diris al ni, ke antaŭe tiu laboro estis plenumita per mano kaj ne povis kontentigi la bezonon de la disvolviĝanta produktado. Nun la maŝino altigis la laborefikon je dek-oblo, kaj la korpoj de verdaj fazeoloj prilaboritaj per tiu maŝino restas sendifektaj. En la enladiga laboreksekcio ni vidis longan laborlinion transportanta multajn plenigitajn ladskatolojn lutotajn. Tie ni intervidiĝis kun Majstro Chen Jieyun. Mi laŭdis: "Kiel plaĉaj estas la verdaj fazeoloj prilaboritaj!"

Majstro Chen diris kun rideto: "Dank' al strikta kunlaboro de la fabriko kaj la produktaĵoj verdaj fazeoloj plukitaj antaŭtagmeze povas esti enladigitaj posttagmeze en la sama tago." Li diris, ke senĉesa renovigo de prilaboraj ekipaĵoj multe akcelis la produktadon. En la lastaj tri jaroj ili plenumis pli ol 150 gravajn renovigojn, fabrikis 114 specialajn maŝinojn kaj funkciigis 25 aŭtomatajn laborliniojn.

*Angulo de la laborejo*



# Optika Inĝeniero Lai Aiguang

**I**NGENIERO Lai Aiguang laboras en iu fabriko de optikaj instrumentoj en suda Ĉinio. Oni tre admiras lian entuziasmon en klopodo por atingi sciencan altajn. En la lastaj jaroj li sukcesis projekti pli ol 40 objektivajn, kaj per tio faris sian kontribuon por disvolvi la elektronikan industrion de nia lando.

Sed ĉiufoje, kiam oni laŭdas lin, li ĉiam atribuas siajn atingojn al la kulturado de la patrio.

En 1960 Lai Aiguang revenis al sia patrio. Subvenciate de la ŝtato, li studis en prepara lernejo por ĉinaj elmigrintoj kaj kolegio, en kiuj li estis bone zorgata en la lernado kaj vivo. Post la diplomitiĝo li eklaboris en la fabriko, kie kamaradoj traktas lin kiel sian parencon kaj li ĉiam sentas varmon en la koro. Li havas feliĉan familion. Li diris al mi, ke iutage antaŭ kelkaj jaroj lia superulo Maljuna Wang vokis lin al si kaj demandis, kiom da jaroj li havas. Li mire respondis: "Jam tridek jarojn!" Wang diris ridetante: "Junulo, vi devas trovi por vi knabinon por geedziĝo!" Poste li konatigis al li Malgrandan Jiang, parolistinon de la disaŭdiga stacio de la fabriko. Iom post iom ili enamiĝis kaj fine fondis la familion. Por ke Lai Aiguang havu pli da tempo fari sciencan esploradon, la fabriko ŝanĝis la laboron de Malgranda Jiang por ke ŝi pli multe zorgu la dommastrumadon, kaj havigis al ili vastan kaj helan apartamenton.

## MALFACILE NASKITA OBJEKTIVO

Nia interparolado nature transiris al la temo pri la objektivaj faritaj de Lai Aiguang, precipe pri la naskiĝo de lia unua objektivo.

Tio okazis en la jaro 1970, kiam la ŝtato urĝe bezonis objektivon por paŝo-post-paŝa malgran-

diga kamero en disvolvado de nia elektronika industrio. Sed tiam nia lando ne kapablis produkti tian objektivon, kaj ankaŭ importado de ĝi estis malfacila. Sekve do Lai Aiguang akceptis la projektan taskon.

Tia objektivo devas havi altan distingpovon. Fotilo kun tia objektivo povas fari klaran foton de kelkcent, eĉ mil elektronikaj elementoj sur lentogranda silicilameno uzata en produktado de integra cirkvito. Ĉu li kapablas plenumi tian projektan taskon?

Li studis nur ĝeneralan optikan teorion en la fizika fakultato de iu pedagogia kolegio kaj diplomitiĝis en 1965. En la fabriko li daŭrigis sian studadon en praktiko. Li ellaboris por si planon pri memlernado de la optika teorio kaj fremdaj lingvoj, kaj dediĉis preskaŭ sian tutan tempon kaj energion por la studado, krom plenumo de la taga laboro kune kun laboristoj kaj partopreno en necesaj sociaj aktivadoj. Post kelkaj jaroj li jam posedis kompare multflankan optikan teorion kaj povas legi materialojn en la angla kaj japana lingvoj.

Akceptinte la taskon, li vizitis kelkajn universitatojn kaj institutojn de Beijing (Pekino), Shanghai (Ŝanhajo), Hangzhou (Hangĝou) kaj aliaj urboj, por konsulti tieajn profesorojn kaj specialistojn. Nelonge post tio li komencis la projektan laboron.

La objektivo konsistas el pluraj lensoj. Dum la projektado li devis kalkuli la dikecon, grandecon kaj refraktigan povon de ĉiuj lensoj kaj la radiuson de la du globsurfacoj. Por garantii altan distingpovon de la objektivo, li devis fari ankaŭ multan laboron pri analizado kaj ekvili-




brigado. Se iu ajn donitaĵo ne konformis al la postulo, li devis ŝanĝi ĝin, kaj tio postulis ankaŭ la ŝanĝon de aliaj donitaĵoj. Tia operacio ofte ripetigis dekojn eĉ centojn da fojoj por akiri centmilojn, eĉ milionon da donitaĵoj. Tiam mankis al li elektrona komputero, li do uzis man-kalkulmaŝinon. Ĉiutage li kalkuladis, analizadis kaj komparadis la donitaĵojn dum pli ol dek horoj. En daŭro de preskaŭ duonjaro li fine projektis sian kontentigan objektivon. Sed ekzameno al la produktaĵo laŭ tiu projekto pruvis ke ĝi tute ne konformis al la postulo. La unua projekto malsukcesis.

Tio okazis ekster lia atendo kaj tre ĉagrenis lin. Ĉe tio gvidantoj de la fabriko kuraĝigis lin, dirante: "Malsukceso estas la patrino de sukceso. Serioze resumu sperton, ĉerpu lecionon el tio kaj vi certe sukcesos!" Ankaŭ laboristoj diris: "Neniom timinda estas la malsukceso. En tia komplika afero ne eviteblas malsukceso. Daŭrigu vian esploradon!" Tiuj vortoj refreŝigis lian kuraĝecon por plua projektado. Li refoje vizitis la Zhejiang-an Universitaton, kie li trovis la kaŭzon de la malsukceso helpate de instruistoj. En plia duonjaro, sub la helpo de siaj kolegoj li sukcese projektis la objektivon por paŝo-post-paŝa malgrandiga kamero.

Tiu objektivo ricevis la fabrikmarkon "Dong-feng". En la Guangzhou-a (Kantona) Foiro iuj eksterlandaj komercistoj provuzis ĝin kaj konstatis, ke ĝi jam atingis internacian nivelon.

## ALIA SUKCESO

Post la sukcesa projektado de la unua objektivo, Lai Aiguang projektis plurajn objektivojn de malsamaj normoj por unuapaŝa malgrandiga kamero kaj paŝo-post-paŝa malgrandiga kamero. Li elmetis al si novan problemon: Ĉu la vidkampo de objektivo por paŝo-post-paŝa malgrandiga kamero povas esti plivastigita? Ĉu ĝia disting-



*Lai Aiguang en biblioteko*

povo povas esti ankoraŭ pli altigita? Ĉu la bildkvalito povas pliboniĝi? Nome, ĉu povas esti klare fotitaj la dekoble multigitaj elektronikaj elementoj sur lentogranda silicilameno? Kaj li komencis novan esploradon.

En sia projektado, precipe tiu de la unua objektivo, Lai Aiguang ekkonis, ke lerni kaj ĉerpi en- kaj eksterlandan sperton estas utila al lia laboro, tial li multe legis diversajn materialojn pri optika projekto.

Dum la unuafoja vizitado al sia bopatrino en Shanghai, anstataŭ resti en ŝia hejmo aŭ ekskursi al vidindejoj, li ofte iris sola al biblioteko por legi koncernajn materialojn. Poste li eĉ tien kondukis sian edzinon por ke ŝi helpu lin. Informiĝinte pri lia alveno, parencoj venis por vidi la novedzon, tamen faris nur vanan viziton. La bopatrino diris al ili kun rideto: "Eĉ mi mem ne klare vidis lian vizaĝon, por ne paroli pri vi."

Lai Aiguang rearanĝis la strukturon de sia origine projektita objektivo kaj fine sukcese elfaris sian unuan objektivon de vasta vidkampo.

Eksterlande, por fabriki la samspecan objektivon necesas speciala vitro, kian nia lando tiam ne povis produkti. La objektivo farita de Lai Aiguang el alispeca vitro konsistas el malpli multaj lensoj kompare kun samspeca eksterlanda objektivo. Provuzado pruvis, ke ĝia kvalito jam atingis la nivelon de la importita produktaĵo.

Post tio li daŭrigis sian penan esploradon kaj projektis plurajn avangardajn objektivojn. Iu el ili kun malgranda volumeno, malmultaj lensoj kaj malmulta kosto povas multobligi rapidecon de kliŝado de integra cirkvito.


## NOVA PAŜO

En la lastaj jaroj Lai Aiguang ĉiujare plenumis 6-7 optikajn projektojn. Lia diligenta laboro jam donis multajn fruktojn kaj pro tio li promociiĝis kiel inĝeniero kaj estis honore titolita kiel modela pioniro de la tutlanda elektronika industrio en lernado de Daqing (Daking). Liaj brilaj faroj

cirkulis en la tuta branĉo kaj multaj unuoj sendis siajn reprezentantojn al li por lerni.

Iu demandis lin: “Kiel vi povas ĉiujare plenumi tiom da projektoj?” Li respondis: “La rapida disvolviĝo de la elektronika industrio elmetas al ni ĉiam pli multajn postulojn kaj pezajn taskojn. Kvankam nun ni jam havas elektronajn komputerojn kaj oni povas rapide fari operaciadon, tamen ni ankoraŭ ne povas kontentigi la bezonon. Mi pensis, ke ĉiu objektivo estas farita el pluraj lensoj, ĉiu el kiuj donas malsaman efikecon al bildkvalito. Ĉu troviĝas inter ili lenso, kiu donas plej grandan influon al la bildkvalito? Retrorigardinte la projektan proceson de iuj objektivoj kaj analizinte la efikecon de ĉiu lenso mi trovis la leĝon. Dank’ al tio nia projektado estas multe pli rapidigita.”


En februaro ĉijare, kiam mi vizitis la fabrikon, li ĝoje diris, ke en 1978 ili plenumis la jaran projektan taskon difinitan de la ŝtato en nur tri monatoj, kaj la plano ĉijara estas glate plenumata.



*Lai Aiguang studas novan teknikon kune kun laboristoj.*



# Vivo de Muzikisto



*Qin Pengzhang*

**D**IREKTISTO de la Centra Nacia Filharmonio Qin Pengzhang sin okupadas pri muziko de pli ol 40 jaroj. Antaŭ nelonge mi intervjuis lin en lia hejmo.

La loĝdomego en Chaoyang-kvartalo sin banis en vespera sunbrilo. Enpaŝinte en la apartamenton de la muzikisto, mi min prezentis kaj enmanigis al li ekzempleron de "El Popola Ĉinio". Li eklegis la titolon de la revuo en Esperanto. "Ĉu vi parolas Esperante?" mi ĝoje demandis. "Mi komprenas iom, sed parolas nebone," li modeste diris. Li havas 60 jarojn. Krom direktado de orkestro li ludas bivon kaj klarneton, komponas kaj ankaŭ studas fremdajn lingvojn en postlaboraj horoj.

## AMO AL LA LABORO

En sia aĝo de 13 jaroj li eklernis ludi bivon kaj klarneton. En la aĝo de 18 jaroj, li laboris en iu poŝtofacejo. Li uzis plejparton de sia enspezo por lerni muzikon. Li diligente studis, ĉiutage sin ekzercis en ludado ĝis profunda nokto kaj prezentis de tempo al tempo en koncerto.

Li laboris kiel direktisto de la menciita filharmonio ekde ĝia fondiĝo en la komenca periodo post la Liberiĝo. De 1951 ĝis nun li kvarfoje turneis eksterlande kun la filharmonio kaj vizitis 11 landojn. En la pasintaj jaroj li senlace klopodis por studi, adapti kaj reverki ĉinajn popolajn muzikaĵojn kaj ĉinajn klasikajn komponaĵojn. Li adaptis kaj reverkis dekojn da tiaj komponaĵoj por solo kaj kunludado, ekzemple, "Bela, Lunbrila, Printempa Nokto super Rivero", "Uverturo de Printempa Festo", "Popola Muziko Sanliu", "Muziko de Jaŭ-nacieca Danco", "Printempo Venas al Lago" k. a., inter kiuj multaj estas ofte ludataj kaj vaste cirkulataj en nia lando. Krome li verkis pli ol 200 muzikaĵojn por teatraĵoj, dancoj kaj filmoj.

En la lastaj jaroj li ankaŭ lernis kaj adaptis fremdlandajn popolajn muzikaĵojn kaj ofte direktis ludadon. En 1977, kiam Prezidanto Tito vizitis Ĉinion, la Centra Nacia Filharmonio ludis por li jugoslavan popolan dancmuzikaĵon "Zagreb". Zagreb estas la hejmloko de Prezidanto Tito. Aŭskultinte la konatan melodion Prezidanto Tito tre ĝojis kaj varme manpremis

kun Qin Pengzhang post la prezentado. Parolante pri tio, li elprenis brilan nigran tekono kaj diris: “Ĝi estas donacita de Prezidanto Tito al mi post la prezentado.”

### AMO AL LA VIVO

En angulo de unu el la ĉambroj de la muzikisto staras pli ol 20 florbazoj. Apresante la florojn, mi demandis lin: “Ĉu tiuj floroj estas kulturitaj de vi?” Kun rideto li respondis: “En postlaboraj horoj mi ŝatas flegi florojn. Konante mian ŝaton miaj kolegoj ofte alportis al mi de aliaj lokoj semojn kaj plantojn de diversaj floroj. Kiam mi laciĝis de laboro, mi povas refreŝigi min per apresado de tiuj aromaj floroj.” Li ankaŭ rakontis al mi sciojn pri florkulturado en vazoj, kaj tio multe interesis min.

Qin Pengzhang estas ankaŭ amatora fotisto. En festotagoj li ankaŭ ŝatas ekskursi kune kun siaj gefiloj kaj amikoj al pitoreskejoj kaj fotografi pejzaĝojn. Foje kaj foje li fotis ankaŭ prezentadon de ensemblo, kaj li ĉiam mem faris riveladon kaj kopiis fotojn. Li prezentis al mi albumon, en kiu klaraj fotoj pri pejzaĝoj kaj viglaj homfiguroj montris la lertecon de la muzikisto en fotado.

Matene li ofte ludas volanon kun siaj gefiloj. Direktado de orkestro estas tre laciga laboro, tial direktisto devas havi fortikan korpon. Por tio Qin Pengzhang, krom partopreno en sporta aktivado, ĉiam biciklas al la laboro seninterrompe eĉ en tagoj de vento, pluvo kaj neĝo. Ĝuste pro tio li malofte malsaniĝas kaj restas fortika en tia granda aĝo.

### KULTURADO DE GEJUNULOJ

En liberaj tagoj la hejmon de Qin Pengzhang vizitas multaj gastoj, inter kiuj estas liaj malnovaj amikoj kaj ankaŭ junaj muzikamatoroj venantaj por konsulti lin. Vidinte, ke ĉiam pli multiĝas amantoj de muziko, li tre ĝojas. Li diris: “Mi lernigos al ili ĉion kion mi scias.” Li organizis la lernantojn en plurajn grupojn kaj donas al ili unu lecion en ĉiu semajno. Liaj lernantoj troviĝas ĉie en la lando kaj iuj el ili jam atingis grandan sukceson en la arto.

### FELIĈA FAMILIO

La geedzoj de Qin Pengzhang havas tri filinojn kaj unu filon. La plejaĝa filino jam edziniĝis. Same kiel sia patrino Yang Yunfeng, ŝi estas kvietaj kaj teneraj kaj amas literaturon. Ŝia edzo estas dancisto kaj ili havas bebon. Ili loĝas en loĝejo por la Orienta Kantodanca Trupo. La aliaj filinoj kaj filo iom similas al la patro kaj ĉiuj estas amatoroj de muziko. Montrante la fortepianon, ĉinan sepkordan citron, violonon kaj biron en la ĉambro li diris al mi: “Ĉiuj ili estas aĉetitaj por miaj gefiloj.”





En iu semajnofino mi denove venis al la hejmo de Qin Pengzhang. Apenaŭ mi paŝis en la pordon de lia apartamento, mi ektrovis min en vigla kaj ĝoja muzika vespero. Lia dua filino ludis klarneton, la plej juna filino violonon, lia filo biva, li mem fortepianon kaj aliaj du junuloj huĉinojn (arĉajn kordmuzikilojn): ili kune ludis "Bela, Lunbrila, Printempa Nokto super Rivero". La verko estas eminenta klasika komponaĵo por biva solo. Nun ĝi fariĝis, post

reverko de Qin Pengzhang, peco por kuna ludado de ĉinaj muzikiloj, tamen konservas sian originalan stilon.

Ĝi estas unu el la plej ŝatataj ĉinaj komponaĵoj en nia lando. Ĝi priskribas amon de nia popolo al la bela naturo de la patrolando. Ho, kiom da homoj estas ravitaj de tiu bela melodio kun vigla kaj varia ritmo prezentanta kvietan belan lunnokton ĉe riverbordo...

### *Ekzercado*







*Ozaŭa Juki, fratino de Verda Majo, renkontiĝis kun la gefiloj de Verda Majo en Beijing. La unua de maldekstre estas japana verkistino Saŭaĉi Hisae.*

GONG PEIKANG:

# Verda Majo en Ĉinio

(Daŭrigo)

V.


En la 15-a de aŭgusto, 1945, la japanaj agrosantoj senkondiĉe kapitulacis. Venkis la ĉina popolo kiu persiste bataladis dum ok jaroj. Venkis ankaŭ nia Verda Majo. Kun granda ĝojo oni celebris la venkon tage kaj nokte.

Sed, tiutempe Ĉiang Kajŝek, sub kamuflo de interparolado inter Kuomintango kaj la Komunista Partio de Ĉinio, streĉe preparis internan militon kun intenco ekstermi la Komunistan Partion de Ĉinio per unu bato, kaj rabi la fruk-

tojn de la venko de la rezistmilito por estingi la fajron de la ĉina revolucio. Tio ĵetis ombrojn de interna milito sur la koron de la ĉina popolo, kiu estis ĵus liberigita el sub la hufoj de japanaj diabloj kaj celebranta la venkon de la Kontraŭ-japana Rezistmilito.

Verda Majo kaj ŝia edzo tiam laboris en la "Demokratia kaj Politika Ligo de la Nordoriento" en Ĉongking. La organizaĵo decidis sendi ilin kaj aliajn kamaradojn al la Nordoriento por tie fari laboron kontraŭ interna milito, ĉar tie estis





Japanaj eldonadoj pri  
Verda Majo

la hejmloko de Liu Ĵen, tiu decido kompreneble ĝojigis ilin. Sekve, la geedzoj kun ilia trijara filo Stelo venis al Hankoŭ en mezo de novembro, kaj planis iri al la Nordoriento kune kun tieaj kamaradoj. Tiam tre malfacila estis la trafikado, la fervojo atendis riparadon kaj kuomintangaj spionoj streĉe ilin persekutis. Verda Majo kaj ŝia edzo planis foriri de Hankoŭ je la 5-a de januaro, 1946, tamen ĝuste en la posttagmezo de la 4-a, spionoj per damnindaj rimedoj trompe forportis Stelon por malhelpi ilin reveni ĝustatempe al la Nordoriento. Kaj nur en la vespero de la 10-a de januaro, kiam publikigis la "Armistica Interkonsento" inter Kuomintangoj kaj la Kompartio, la trijara Stelo revenis al la sino de la patrino. En la sekvinta tago, la tuta familio ekveturis per ŝipo de Hankoŭ al Ŝanhajo. En la unua tagdeko de februaro, ili startis de Ŝanhajo, veturis per ŝipo kaj surteriĝis ĉe Kinhuangdaŭ, kaj poste atingis Ŝenjang. Tiam estis jam la meza tagdeko de februaro. Ĉar Verda Majo gravediĝis kaj estis malfacile por ŝi fari vojaĝon, ŝi devis portempe resti ĉe parenco de Liu Ĵen en Ŝenjang, kaj Liu Ĵen mem iris plu norden. Somere de la jaro, naskiĝis la filineto Hiaŭlan, kaj post tio Verda Majo, trarompinte la blokadon de Kuomintangoj, fine atingis Harbinon, la ĉefurbon de la tiama Nordorienta Liberigita Regiono.

Tiam la Ĉiang Kajŝek-a reakciularo disŝiris la "Armistican Interkonsenton", faris plenamplaksan internan militon kaj senbride invadis la liberigitan regionon. Kiam Verda Majo venis tien, la banditoj de Ĉiang Kajŝek jam proksimiĝis al

Songhua-rivero, tial ŝi kune kun la ĉefa organo de la Nordorienta Liberigita Regiono retiriĝis al Giamusi. Tiam, Verda Majo malfermis la trian ĉapitron de sia batala vivo en Ĉinio.

Estas neimageble, kiom malfacile estis la materiaj kondiĉoj en la tiama liberigita regiono pro strikta blokado de la Kuomintanga reakciularo. Tamen por la geedzoj, kiuj longtempe vivis en regiono regata de Kuomintangoj kaj propraokule vidis tie neraciajn fenomenojn kaj arde sopiris la novan vivon, ĉi tie estis tute nova mondo en politiko. "Serena estas la ĉielo de l' liberigita regiono". La popolo, la registaro kaj la armeo intimas kvazaŭ fiŝo kaj akvo. La registaro kaj la popolo de la liberigita regiono distingis la japanajn militaristojn disde la japana popolo, opiniante, ke ambaŭ popoloj de Ĉinio kaj Japanio estis same viktimoj de la japana faŝismo. Verda Majo profunde sentis, ke ŝi jam venis al sia ideala loko kaj pro tio aktive sin jetis en novan batalon.

Invitite de la Nordorienta Universitato ŝi instruadis tie. La universitato estis lernejo kiu ricevis revolucionan hardadon en Jan-an. Ŝi faris entuziasman paroladon en la bonveniga kunveno kaj indigne malkaŝis la krimadon de la Kuomintanga reakciularo ekfari internan militon, laŭdis la liberigitan regionon gvidatan de la Komunista Partio de Ĉinio, kaj esprimis sian decidon kontribui sian energion por la popola liberiga afero.

Tamen tiutempe refoje gravediĝis Verda Majo. Por labori pli energie, ŝi decidis fari abortan

operacion. Pro la dekjara malfacila kaj milita vivo la sano de Verda Majo estis tre malforta. Samtempe konsiderante la malbonajn kuracajn kondiĉojn de la liberigita regiono, la organizaĵo multfoje malkonsilis ŝin fari tion. Sed ŝi jam faris firman decidon. Tamen fiaskis la operacio, kaj Verda Majo finis pro tio sian junan vivon de nur 35 jaroj. Tio okazis je 14-a de januaro de 1947. Post tri monatoj, forpasis ankaŭ ŝia edzo Liu Ĵen pro malsano.

## VI.

Verda Majo postlasis du orfojn: Liu Hing (Stelo) malpli-ol-kvin-jara kaj lia fratino Liu Hiaŭlan malpli-ol-unu-jara. Nun la gefiloj de la martiroj jam fariĝis gejunuloj dank' al flegado de la Kompartio kaj la popola registaro. La gefratoj diplomitiĝis respektive en la Pekina Universitato kaj la Tangŝan-a Fervoja Instituto en la kultura revolucio, kaj nun ĉiu el ili jam havas sian familion kaj laboras respektive en mezlernejoj de Siĉuan kaj Ninghia.

Ili serĉis parencojn de sia patrino en Japanio dum longa tempo. Kaj en la 15-a de aŭgusto de 1977, ilia letero fine trovis siajn adresitojn — la onklinon kaj onklon en Japanio, nome la fratino kaj fraton de Verda Majo. En la 18-a de aŭgusto de 1978, la onklino Ozaŭa Juki (origine Niŝimura Jukiko) venis al Pekino kiel membro de la Vizitgrupo al Ĉinio de Japanaj EPĈ-amikoj kaj intervidiĝis kun siaj genevoj. Tio aldonis novan paĝon al la amika historio inter Ĉinio kaj Japanio.

S-rino Ozaŭa Juki renkontiĝis kun amikoj de sia fratino en Pekino. Kaj en Ŝanhajo, la loko kie la fratino siatempe batalis, ŝi intervidiĝis kun Bakin kaj aliaj ŝanhajaj esperantistoj kun kiuj Verda Majo siatempe pasigis neforgeseblajn tagojn. Emociite de tio, la maljunulino ekklarmis. Ŝi rememoris kiel ŝi adiaŭis sian fratino en la haveno de Jokohama, ŝi ja ne atendis ke la adiaŭo fariĝis ilia poreterna disiĝo. Ŝi esprimis, ke ŝi volas, kiel sia fratino, kontribui sian restantan vivon por la amikeco inter Ĉinio kaj Japanio de generacio al generacio.

La "Elektitaj Verkoj de Verda Majo" jam estas japanigitaj kaj eldonitaj. Japanaj progresemu-

loj, verkistoj kaj komentariistoj alte taksis la verkojn kaj vivon de Verda Majo. S-ro Tone Koiĉi en sia verko "Vivo de Teru" skribis: (Teru) estis unu el la japanoj kiuj en tiuj ŝtormaj jaroj . . . vokis ne nur al Japanio sed ankaŭ al la tuta mondo." Ankaŭ F-ino Saŭaĉi Hisae skribis plurajn artikolojn pri Verda Majo, ekz., "Perfido kaj Amo al Sia Patrolando" (Aldono de "Ekonomia Revuo" 1972) kaj "Forgesita Vivo, Hasegaŭa Teru" (aperigita en sinsekvaj numeroj de "Tokia Novaĵo" 1976) kaj aliajn. Ŝi skribis: "En la 15 jaroj de nepaciebla milito kontraŭ Ĉinio, ekzistis nur unu homo, Hasegaŭa Teru, kiu estis fierinda kaj kara por ni." Aŭguste de la pasinta jaro, F-ino Saŭaĉi kune kun S-ino Ozaŭa Juki, fratino de Verda Majo, vizitis Ĉinion kaj renkontiĝis kun la gefiloj de Verda Majo. Post sia reveno al Japanio, ŝi skribis aliajn artikolojn, interalie "Vojaĝo por Serĉi Hasegaŭa Teru" kaj "Noto pri Renkontiĝo kun Georfoj de Ĉinio kaj Japanio post 40 Jaroj", kiuj aperis respektive en japanaj gazetoj "Printempo kaj Aŭtuno de





Literaturo kaj Arto" kaj "Semajna Gazeto de Literatura Printempo". Kaj ankaŭ kelkaj tokiaj jurnalaj raportis per informoj titolitaj "Vivo Dediĉita por Batalo kontraŭ Milito kaj por Amikeco inter Japanio kaj Ĉinio", "Renkontiĝo Brildona por la Amikeco inter Japanio kaj Ĉinio" ktp., pri la aktivado de Verda Majo kaj la emocia sceno de la renkontiĝo de ŝia fratino kun ŝiaj gefiloj en Ĉinio.


Verda Majo forpasis jam tridekdu jarojn. Ŝi luktadis la tutan vivon por la liberiga afero de la ĉina popolo kaj la kontraŭfaŝisma batalo de la monda popolo. Dum la dek jaroj, ŝiaj spuroj kovris duonon de Ĉinio. Ŝi portis amikecon de la japana popolo, restigis ardan amon kaj noblan internaciismon al la ĉina popolo kaj ĉinaj esperantistoj.

Si vivas en nia koro.

(fino)

Manskribajo de Verda Majo

Artikoloj pri Verda Majo, aperigitaj en la ĉinaj jurnalaj Renmin Ribao kaj Wen Hui Bao



1. oni sonorigas ...  
 - «oni» 这字, 不一定要翻土来. 例如: oni diras, ke...  
 «听说», oni malfermis pordon, kaj mi vidis  
 almozulon Harantan. 开门了, 我看...  
 «sonorigas» - 事实上打铃. 我用的 cop. 字不适当吧.

2. rigardi 和 vidi 不同. rigardi 是看脸, 望, vidi  
 是着眼, 瞄着. mi vidis ŝin survoje. 在路上我看见她.  
 她. mi rigardas ŝin, 我瞪她. mi plu ne vid-  
 as = mi fariĝis blinda.

mi aj okuloj -----, tamen ----- ke mi  
 ne rigardas ilin. 虽然我眼睛还钉住在他身上  
 我却不能望得, 我差不多望着他们.

3. ~~我~~ 我所望的是别一种看不见的东西.  
 不是望到

4. mi dum ----- taksadis «我定稿是», 不要加「精  
 神», 因为这是一些什么的性质

5. sur la lito. 她表示一定的, 就是 mia 而不是别人  
 的. 所以中文里不必用那语 «在床上又睡着了».

6. instinkta korpala malpato 本能的肉体的厌恶

7. Ni tion ne torias... 这不是理论, 而是感觉

8. 这 ~~是~~ 并不是 ~~对~~ 对其他人格的 ~~爱~~ 爱 ~~的~~ 的 ~~爱~~ 爱 ~~的~~ 的 ~~爱~~ 爱  
 的爱. 不能和 ~~人~~ 人 ~~相~~ 相

9. 五才

10. oni sciigas -

11. 调查 观察



# Pri la Ok Pitoreskejoj de Taiwan


**T**AIWAN (Tajvan) estas kromnomata Ĝardena Insulo en Pacifiko pro siaj belaj pejzaĝoj. Ĝiaj altaj montoj, vasta maro, belaj ĉinstilaj konstruaĵoj kaj ĉarmaj florpilantoj allogis sennombrajn turistojn.

Taiwan havas ok pitoreskejojn kaj 12 rigardindajn lokojn. Tiu ĉi artikolo koncize prezentos al vi la ok pitoreskejojn.

## LA NUBOMARO DE ALI-MONTO

Nordoriente de Jiayi-gubernio de Taiwan, sin trovas la fame konata

Ali-monto. Ĝi havas 18 montpin-tajn, el kiuj la plej alta atingas 2,905 metrojn super la marnivelo. Ĝiaj lokoj interesaj por turistoj okupas areon de 175 hektaroj kaj ĝiaj primitivaj arbaroj, nubomaro kaj sakurfloroj estas mirinde belaj.




*Nubaro de  
Ali-monto*



# Vidindaĵoj en Taiwan



Monto sur kiu serpentumas ŝoseo





Chunqiu-turoj





Naciminoritatoj




Akvofalo



Riyuetan-lago





Sur la bordoj de Aihe-rivero de Gaoxiong

La arbaroj sur tiu monto konsistas el multspecaj arboj de tropika, mezvarma kaj glacia zonoj, kiaj ruĝa falscipreso (*Chamaecyparis taiwanicola*), falscipreso (*Chamaecyparis taiwanensis*), cugo (*Tsuga chinensis*) kaj pino. Tie kreskas unu ruĝa falscipreso kun aĝo de pli ol 3,000 jaroj, kiu altas 52 metrojn, havas trunkon kun cirklo de ĉ. 20 metroj kaj estas nomata Dia Arbo de Ali-monto. Alia samspeca arbo kiu ankoraŭ kreskas prospere altas 48 metrojn kaj aĝas 4,100 jarojn.

Ĉirkaŭ la fino de ĉiu somero, sakuroj floras pompe sur Ali-monto, kaj tiam aperas tie floraj maroj blankaj kaj helruĝaj. Krom sakuroj ĉie ĉarmas ankaŭ rododendroj, lilioj kaj aliaj.

Zhushan-monto norde de Ali-monto estas bona loko por apreci

la fame konatan Ali-nubomaron. Blankaj nuboj leviĝantaj el la valoj formas nubomaron ŝanĝiĝeman ĉe la monta talio. Se la nubomaro aperas ĉe la sunleviĝo, la pejzaĝo ankoraŭ pli ĉarmas!

### NEĜO SUR LA JADA MONTO

Sur Zhushan-monto oni povas vidi ĉielskrapan "kristalan ekranon" proksime en la oriento. Tio estas la Jada Monto. Ĝi situas je pli ol 50 km. oriente de Jiayi-gubernio, ĝia ĉefpinto altas 3,997 metrojn super la marnivelo kaj estas la plej alta montpinto en Taiwan kaj la aliaj sudorientaj provincoj de nia lando. Ĉirkaŭ ĝi staras la pintoj orienta, okcidenta, suda kaj norda en romba formo. Tiuj montpintoj altas je pli ol 3,500 metroj. Sur ili estas malvarmege kaj neĝas dum la periodo de oktobro ĝis aprilo de la sek-

vanta jaro dum kiu la montpintoj aspektas malproksime kiel jadaj montoj. Sur la montoj oni povas vidi la vastegan Pacifikon en la oriento kaj Taiwan-markolon en la okcidento kaj iam eĉ nubaron super marbordaj altaj montoj de Fujian-provinco. Vere bela loko por serrenigi la bruston!

Sur rokmuro de la Jada Monto estas antikva vojo Batongguan. Laŭdire la vojo estis konstruigita de la nacia heroo Zheng Chenggong por konkeri la orientan parton de Taiwan en la lastaj jaroj de Ming-dinastio (1368-1644). Ekde tiam la orienta kaj okcidenta partoj de Taiwan bone interligiĝis. Alia onidiro rakontas ke dum la reg-periodo de la imperiestro Guangxu (1875-1908) de Qing-dinastio (1644-1911) la imperiestra sendito kaj milita gubernatoro konstruigis montvojon kun longeco de 128 km. por defendi la

teritorion kaj faciligi interhelpon inter la orienta kaj okcidenta partoj. Batongguan estas parto de tiu vojo. Same kiel la Granda Muro kaj la Granda Kanalo ĝi montris la diligentecon, kuraĝecon kaj persistemon de la ĉina laboranta popolo.

### RIYUETAN-LAGO

Ĝi situas en la mezo de Nantou-gubernio kaj en nordo de la Jada Monto kaj estas alinomata Draka Lago. Ĝi estas la plej bela loko de Taiwan kaj fame konata tra la mondo. La lago situas sur monto je 760 metroj super la marnivelo. Ĝi profundas je ĉ. 20 metroj kaj ĝia ĉirkaŭa bordo longas 24 km. Meze de ĝi estas insuleto Guanghai.

La formo de ĝia parto norde de la insuleto similas al la suno kaj tiu de ĝia parto sude de la insuleto al lunarko, tial ĝi portas la nomon Riyuetan (*ri* ĉine signifas sunon, *yue* lunon kaj *tan* lagon). La lagakvo estas tre klara kaj pura, la ĉirkaŭaj verdaj montoj speguliĝantaj en la lago pliigas ĝian belon. En lunaj noktoj de aŭtuno la lago aparte ĉarmas en la fabela lumo mistera.


Ĉe la piedo de la monto Qinglong sude de la lago troviĝas majestaj temploj Xuanguang kaj Xuanzhuang. En la lasta estas konservata osto de la fame konata bonzo Xuanzhuang de Tang-dinastio (618-907). Post ĝi staras 9-etaĝa grandioza kaj majesta pagodo Ci'en alta

je 45 metroj, kiu konstruiĝis laŭ antikva pagodo de Song-dinastio (960-1279). Sur la pagodo oni povas vidi la panoramon de la lago Riyuetan.

### PRINTEMPO DE DATUN-MONTO

Datun-monto situas norde de la urbo Taibej kaj altas 1,090 metrojn super la marnivelo. Tiuloke ne estas frosto en vintro, nek varmeĝo en somero. Kaj ĝi estas aparte ĉarma en printempo: Ĉie vidiĝas florantaj sakuroj, rododendroj, kamelioj kaj persikfloroj. Sur ĝi troviĝas termofontoj kaj akvofaloj. Fame konata estas la granda akvofalo Datun. En ĝia najbareco kons-

*Danshui-rivero*





truiĝis speciala teraso por rigardi la akvofalon.

Sur la montsupro oni povas vidi ĉe la okcidenta flanko Danshui-riveron similan al jada rubando, sur kiu veturas velŝipoj. Sur Shamao-monto en ĝia proksimeco estas rompitaĵoj unuj sur aliaj en formo de ume-floraj petaloj, kiuj moviĝas en ventblovo. Krome tie estas ankaŭ pluraj elegantaj konstruaĵoj kaj belaj lokoj.

### KANJONO DE TAILUGE

La kanjono komenciĝas de Tailuge ĉe la nordorienta marbordo de Hualian-gubernio kaj longas ĉ. 19 km. Ĝi estas tre zigzaga kaj ĝiaj bordoj estas tute el marmoro. Ĉe la enirejo estas impona ponto super la kanjono. Nelonge post trapaso de la ponto oni povas vidi templon kun verdaj tegoloj kaj ruĝaj muroj ombratan per verdaj pinoj kaj cipresoj. Apud la templo estas akvofalo en du akvokolonoj pendantaj sur la rokmuro. Post trapaso de multaj longaj kaj mallongaj tuneloj oni venas al la fame konata klifo Zhuilu, sur kies alta kruta muro konstruiĝis danĝera vojeto.

### KLIFO QINGSHUI

La marborda ŝoseo de Suwo ĝis Hualian kun longeco de 120 km. ekkonstruiĝis en 1874 kaj malfermiĝis al trafiko en 1931. La tuta ŝoseo kun multaj tuneloj serpentumas ĉirkaŭ monttalo. La klifo Qingshui sin trovas inter ĝiaj stacioj Chongde kaj Heping kaj longas ĉ. 5 km. Plej danĝera parto de la ŝoseo estas tiu sudoriente de Qingshui-monto sude de Qingshui-stacio. Ankaŭ tiu klifo estas marmora kaj altas 420 metrojn super la maro. Sur la alta krutaĵo fronta al la vasta maro oni konstruis ŝoseon kun tuneloj. Super la sepa tunelaperturo



*Antikva turo Wenchangge en Tainan*

estas ĉinaj ideografiaĵoj signifantaj "Qingshui-tunelon".

### VESPERA SUNBRILO DE ANPING

La urbeto Anping estas unu el la sep distriktoj de la urbo Tainan kaj distancas de la urbocentro je 6 km. Antaŭe inter Tainan kaj Anping sin trovis interna maro Taijiang. Ekstere de la maro kuŝis sep insuletoj, kaj Anping estis la unua en la

nordo. Tiam tie estis natura bona haveno, unu el la kvar grandaj havenoj de Taiwan, kiu havis oftan maran trafikadon kun Fuzhou kaj Xiamen de Fujian-provinco. Poste la haveno ŝtopiĝis per sedimentaĵoj, kaj hodiaŭ nur fiŝŝipoj povas veturi tie.

Anping spertis multajn ŝanĝiĝojn en la lastaj jarcentoj. Post kiam nederlandaj koloniistoj invadis Taiwan, ili konstruigis tie for-

treson. Post kiam Zheng Cheng-gong reprenis Taiwan, ĝi estis nomita Anping. Hodiaŭ, en la antikva fortreso ankoraŭ restas pluraj rustigitaj antikvaj kanonoj interesaj por turistoj. En la urbeto estas pli ol dek antikvaj temploj, el kiuj la plej fama kaj plej antikva estas la templo Kaitaitianhou, konstruita en 1666 p.K.

### FIŜIPAJ LUMOJ DE PENGHU

La insularo Penghu situas en la mezo de Taiwan-markolo. Jam en

Yuan-dinastio (1271-1368 p.K.) la tiama centra registaro starigis tie lokan registaron, apartenantan al Tong-an-gubernio de Fujian-provinco. La insularo konsistas el pli ol 60 insuletoj kaj havas totalan areon de 127 kvadrataj kilometroj. La ĉefaj insuloj estas Penghu, Yuweng kaj Baisha kiuj formas triangulon kun interna golfo larĝa kaj profunda, kie povas ankri fiŝboatoj kaj grandaj ŝipoj. La situo de Penghu inter Taiwan kaj la kontinento faris ĝin paŝ-stono por ĉinoj

elmigrantaj de la kontinento al Taiwan en la antikveco. Por la repreno de Taiwan, Zheng Chenggong unue okupis Penghu kiel bazlokon.

Sur pli ol 20 insuletoj de Penghu loĝas homoj, kiuj ĉefe okupiĝas pri fiŝado. Ĉiuvespere, kiam la suno malleviĝas kaj la nokta vualo falas, sennombraj lumoj de fiŝŝipoj briletas, kaj respeguliĝas kune kun steloj en la maro kvazaŭ sennombraj oraj serpentoj. Krome, sur la insularo troviĝas ankaŭ multaj aliaj interesaj lokoj por turistoj.

*Fiŝistoj de Yeyou-vilaĝo fiŝkaptas.*






## LA ĈINA

## TREZORA

## INSULO

## TAIWAN

de ZHENG DAN



*Tradicia drako-danco*

**T**AIWAN (Tajvan) situas en maro sudoriente de la ĉina kontinento. Oriente de ĝi estas Pacifiko, 600 kilometrojn nordoriente de ĝi estas la Ryukyu-insuloj, ĉ. 300 kilometrojn sude de ĝi trans Bashi-markolo troviĝas la Filipinoj, pli ol 100 kilometrojn okcidente de ĝi trans Taiwan-markolo kuŝas Fujian-provinco.

La totala areo de Taiwan kaj la 79 dependaj insuloj de ĝi inkluzive de Penghu-insularo estas 35,981.2 kvadrataj kilometroj. Taiwan-insulo kun areo de 35,774.68 kvadrataj kilometroj estas la plej granda insulo de nia lando.

Du trionoj de la ĉefa insulo de Taiwan estas montregiono. Ĝiaj

montoj iras de sudo al nordo, la plejparto de ĝiaj ebenaĵoj troviĝas sur ĝia okcidenta marbordo, kie fluas la plejparto de ĝiaj riveroj.

Tiu insulo kuŝas ĝuste inter la tropika kaj varmeta zonoj, kaj ĝia temperaturo en somero kaj vintro estas mildigata de la maro. Pro ĝia proksimeco al la kontinento, ĝi ankaŭ estas influata de frosta aerfluo de la kontinento en vintro. Ĝia klimato apartenas al subtropika ŝanĝigema musona tipo karakterizata per alta temperaturo kaj abundeco de pluvoj kaj ventoj.

La ĉefa greno produktata de Taiwan estas rizo, krome ĝi produktas ankaŭ bataton, tritikon, maizon,

sojfabon k. a. Ĝiaj ĉefaj ekonomiaj plantaĵoj estas sukerkanoj kaj tearbetoj, kaj ĝiaj fruktoj estas bananoj, ananasoj, mandarinoj, longanoj kaj kokosoj. 55 procentoj de la tuta areo de la insulo estas kovrita de arboj de pli ol 3,900 specioj kaj pro tio ĝi estas fame konata kiel natura botanika ĝardeno de Azio. La plej fama el ĝiaj arboj estas kamforarbo, kaj ĉie en la montregionoj kun alteco de 500 ĝis 1,500 metroj super la mara nivelo kreskas tiaj arboj. Kaj Taiwan okupas la unuan lokon de la mondo en produktado de kamforo. Taiwan estas abunda je maraj produktaĵoj inkluzive de pli ol 500 specioj de fiŝoj. 110 specoj de valoraj mineraloj estas jam trovitaj en la insulo kaj la plej gravaj



*Rikoltado de sukerkanoj*

inter ili estas oro, petrolo, karbo kaj sulfuro.

Pli ol 97 procentoj de la dek sep milionoj da loĝantoj de la insulo estas hanoj. Antaŭ la jaro 1946, 80 procentoj de la hanoj loĝantaj sur la insulo devenis de Fujian-provinco, dum la ceteraj 20 procentoj devenis de Guangdong-provinco. Tial oni ĝenerale uzas la dialektojn de suda Fujian kaj Meixian-gubernio de Guangdong, kaj iliaj kutimoj kaj moroj similas al tiuj de la supremenciitaj lokoj. La centoj da miloj da elmigrintoj el la ĉina kontinento post 1946 estas plejparte hanoj el diversaj provincoj de nia lando. La ĉefa nacimalplimulto en Taiwan estas gaŭŝanoj, kiuj estas laboremaj,


grandanimaj, gastamaj kaj lertaj en dancado kaj kantado.

De antikveco, Taiwan estas neapartigebla parto de nia lando, ĝia loĝantaro estas parto de la ĉina nacio. Post la disiĝo de Taiwan de la patrolando en 1949, ĉiuj ĉinoj, inkluzive de la ĉinaj elmigrintoj, deziregas ke frue finiĝos la bedaŭrinda stato de splitiĝo de la lando kaj disiĝo de parencoj, kaj same tion deziras ankaŭ la pacamaj popoloj

kaj landoj de la tuta mondo. En la komenco de la kuranta jaro efektiviĝis normaligo de la rilato inter Ĉinio kaj Usono kaj plene sukcesis la vizito de Vicĉefministro Deng Xiaoping al Usono kun historia signifo. Ĉio tio ne nur utilas al la paco de Azio kaj la mondo, sed ankaŭ pretigis pli favorajn kondiĉojn por reveno de Taiwan al la patrolando kaj por efektivigo de la unuiĝo de Ĉinio.



*Riĉa rikolto de ananasoj*





LIU XINWU:

# La Loko de Amo en la Vivo

(Daŭrigo)

**N**ERIMARKITE, la grandaj folioj de la sterkulioj (*Sterculia platanifolia*) antaŭ la fronta pordo de Beihai-parko jam flaviĝis. Ĉie en la urbo oni parolas pri la studentovarbo de altaj lernejoj. Iutage, ni iris el la Beijinga Biblioteko, trapasis Beihai-ponton interbabilante kaj venis al sterkulio apud la Ronda Urbeto. Starante tie ĉiu el ni eldiris sian decidon.

Mi diris al li: “Mi deziras skribi novelojn pri junaj laboristoj por stimuli niajn samaĝulojn al diligentaj laborado kaj kreado por la efektivigo de modernigo de la patrolando. . . Mi pensas, ke eble estas preferinde ne iri en universitaton por studi ĉinan literaturon, mi prenos la fabrikojn kaj la tutan socion kiel mian universitaton!”

Li forte balancis la kapon saltigante la harpinetojn sur la frunto kaj varme aprobis mian ideon dirante: “Bone! Mi klopodos por trapasi eniran ekzamenon de fremdlingva instituto. Tamen se mi malsukcesos, mi memlernados diligente. Mi pristudis jenajn fenomenojn en la vivo: ne ĉiuj diplomitoj de fakaj studoj estas valoraj diamantoj, nek ĉiuj amatoroj estas nepre senvaloraj ferbuloj. Estas malprudente nuligi la fakajn studojn en institutoj, tamen same erare superstiĉe kredi je tiaj studoj. . . Verŝajne, ĉiam la amatoroj superas la diplomitajn fakulojn en verkado de noveloj.”

Kiel plaĉis al mi tiuj liaj vortoj. Kiel bone li komprenas min. . .

Kaj tiutage, kiam krepuskiĝis kaj ni spiradis la aromon de albiziaj (*Albizzia julibrissin*) floroj sur bordo de la kanalo ĉirkaŭ la Malpermesita Urbo, li premis al mi la manon, unue milde kaj poste firme, kaj longe, longe ne ellasis ĝin. . .

Sed du tagojn poste, kiam mi renkontis lin en trolebuso, mi diris al li jenajn vortojn, kvazaŭ mi rifuzus la feliĉon: “Mi ne vizitos la bibliotekon por unu monato. . .”

Je eksvingeto de la brovoj, li demandis kun rideto: “Por skribi mirindan novelon, ĉu?”

Ankaŭ mi ekridetis kaj diris: “Nun mi ne okupiĝos pri tio. Nia laborejo fondis grupon de teknika renovigo por solvi ŝlosilan problemon. Ni certe laborados dum dekelkaj ĝis dudek noktoj post ĉiutaga deĵoro, Majstro Wei eĉ portis siajn litaĵojn en la laborejon. . . Li nepre volas ke mi aliĝu al la grupo. En la komenco mi iom hezitis, tamen poste ankaŭ mi publikigis mian aproban noton. . .”

Li demandis min: “Kial heziti en la komenco?”

Mi montris al li blankajn okulojn kaj diris: “Stultulo!”

Li ekturnis la kapon kaj ruĝiĝis antaŭ miaj okuloj. . . .

Kaj sekve ni ne intervidiĝis dum unu tuta monato. Tamen lia figuro en mia menso ne nur ne paliĝis, male eĉ fariĝis pli klara kaj pli

kara kaj aminda dum mia rememoro kaj imagita revido. Dum nia klopodado por solvi la ŝlosilan problemon, Majstro Wei laŭdis min: “Xiaoyu, vi laboras kun energio de du homoj!” Tiam mi ĝoje pensis en la kapo: Ho, Majstro Wei, vi ja diris la veron!

### III

La trolebuso ankoraŭ devis trapasi 7 haltejojn por atingi la kinejon Dahua, do mi havis sufiĉe da tempo por bone pripensi.

Ju pli multe mi pensis, des pli klare mi sentis, ke ekzistas demando pri la loko de amo en la vivo, nome ĉu amo havas sian lokon en la vivo de revoluciulo? Kaj kian lokon ĝi okupas?

Antaŭ kelkaj jaroj, mi demandadis min, kial nenia signo de amo montriĝas sur niaj kinejaj ekranoj kaj teatraj scenejoj, kaj kial eĉ tre malofte prezentiĝas sceno en kiu estas geedzoj? Ĉu nia vivo devas esti tia?

Ekzilo de amo el literaturaj verkoj alportis du specojn de malnormalaj fenomenoj. Unu el ili estas, ke iuj junuloj rigardas amoran senton kiel amon kaj iuj el ili eĉ degeneris en friponojn. Pri tio mi ne volas nun direkti mian studon. La alia estas speco de fenomenoj tre ĝeneralaj, nome ne rekoni la ekziston de amo sed nur tiun de geedzeco. Kiam gejunuloj atingis la aĝon de 25 jaroj, ili mem, kaj ankaŭ iliaj gepatroj, gekamaradoj kaj eĉ bonvolaj najbaroj komencas preparoli kaj ekagi por “trovi konvenan objekton por geedziĝo”. Mi opinias, ke oni povas enamiĝi en diversaj manieroj — enamiĝo je la unua inter-

vidiĝo, naskiĝo de forta amo dank’ al interkonigo per parencoj kaj amikoj, reciproka ekamo por interkompreno dum laborado en sama institucio . . . — kaj fariĝi feliĉaj geedzoj kaj krei feliĉan familion. Sed mi oponas kontraŭ geedziĝo, kiu tute ekskluzivas amon. Ja ankaŭ la respektinda Majstro Wei demandis min: “Kian vi volas?” Kvazaŭ mi ne estus serĉanta veran sanan amon, sed elektanta por mi plaĉan lanan veston!

### IV

Descendinte el la trolebuso, mi tuj vidis de malproksime, ke li min atendas malpacience.

Mi trairis la amason kaj kuretis al li.

“Kiel stulte vi faris!” mi lin riproĉis. “Kial nepre skribi sed ne telefoni al mi?”

“Akirinte biletojn mi tuj iris al publika telefono por sciigi vin, sed la linio ĉiam estis okupata. . . Hazarde mi devis preteriri vian fabrikon ĉi-matene por plenumi taskon, tial mi prenis tiun paŝon. . . Nu, ĉu tio iel malbone efikis?”

Mi sentis grandan ĝojon en la koro. Antaŭ longe ni jam interkonsentis, ke ni klopodos ĉiamaniere por frue rigardi la filmon “Sentinejoj sub Neonlampoj”, tuj kiam ĝi estos denove publike ludata. Kiam ni estis en elementa lernejo, ni jam rigardis tiun filmon, tamen tiam ni ne bone komprenis ĝin. Ni volis denove rigardi, per okuloj de plenkreskuloj, tiun filmon malpermesitan dum deko da jaroj. Ni esperis ĉerpi





el ĝi ion kio stimulos nian spiriton al progreso. Mi komprenis lian urĝan senton rapide informi min pri la novaĵo, mi do diris al li gaje kun rideto: “Ne grave! Ni ja povos rigardi la filmon . . .”

Sed kial li montris tian strangan mienon? Li kondukis min al loko iom fore de pordo de la kinejo kaj diris kvazaŭ por pardonpeto: “Okazis io neatendita. . . Infano de mia kolego Maljuna He malsaniĝis kaj li venis al mia domo tagmeze por peti, ke mi deĵoru anstataŭ li je la kvara posttagmeze, kaj mi jam konsentis. Ne riproĉu min. Ni cedu unu el la biletoj al iu kaj vi sola rigardu la filmon . . .”

La unua reago de mia koro estis granda mal-esperiĝo. Mi sola rigardu? . . . kiel mi povus rigardi sola? Kial tiu Maljuna He, kiu sin trudis en nian vivon kaj al kiu mi deziris feliĉan vivon, ĝuste en tiu tempo trovis sian infanon malsana kaj petis mian nun plej bezonatan homon deĵori anstataŭe?

Evidente, ĉiu subtila trajto de mia mieno povis vekti fortan reagon en lia koro. Mi aŭdis lin balbuti hezite: “Se vi ne povos . . . ne volus . . . mi povus tuj telefoni kaj provi por serĉi alian anstataŭanton por li, tamen mi timas, ke mi ne sukcesos . . .”

Parolante kun mi, li tenadis la du biletojn en sia mano. Aŭdinte liajn vortojn, mi ekrigardis lin per larĝigitaj okuloj kaj diris: “Kiel stulte!” Mi tiris el lia mano la biletojn, min turnis al juna paro atendanta biletojn, atingis ilin per kelkaj paŝoj kaj ŝovis la biletojn en la manon de la gracila knabino.

Irante ŝultro ĉe ŝultro al lia laborejo, ni sentis ke niaj koroj ligiĝis ankoraŭ pli firme. Ankoraŭ restis iom da tempo ĝis la kvara, do ne bezonis hasti. Geamantoj ofte preferas pli longan vojon, ankaŭ ni ne estas esceptoj. Nia celloko kuŝis en nordo, tamen ni nin turnis okcidenten . . .

## V

Fine ni venis al la momento por disiĝi.

Ni ne diris adiaŭajn vortojn, ĉar ni denove intervidiĝos en la sekvanta tago. Li sin turnis

kaj iris al restoracio inter apoteko kaj magazeno. Ĝi estas ordinara restoracio.

Li estas kuiristo en tiu restoracio.

Mi ankoraŭ rigardadis kun bedaŭro la vitrajn pordoklapojn kiuj englutis lin, kiam subite iu kaptis min je la brako.

Mi surpriziĝis.

Tiu estis Yamei. Ŝia oblonga vizaĝo envolvita de la karmezina felpa kaptuko plenis je miro.

“Xiaoyu, ĉu vi amikiĝis kun li . . . kun li por geedziĝo?!”

Yamei tiris min kun si antaŭen, kvazaŭ ŝi estus tiranta min kiel misvojiĝintan ŝafidon el danĝero.

“Mi konas lin. Li estas Lu Yuĉun, ĉu ne? Antaŭe ni estis najbaroj. Lia patrino paraliziĝis antaŭ pluraj jaroj, tamen havas bonan apetiton kaj povas bone dormi, kaj kredeble ankoraŭ tiel trenos la vivon por 5 ĝis 8 jaroj — ĝuste pro tio, ke lia prizorgado estas nepre bezonata, li ricevis laboron en tiu malgranda restoracio. Ĉu li diris tion al vi? Ĉu vi volas fariĝi bofilino de paralizulino bezonanta helpon en fekado? Vere stulta kaj stranga vi estas, ke vi ne volas daŭrigi vian studon en universitato kaj amikiĝas al kukbakisto por geedziĝo! Kian valoron havas lia tekniko, kiel ajn eminenta ĝi estas! Xiaoyu, por vi kun tia belaspekto, tia teniĝo kaj tia klereco, ja estas ne malfacile akiri faman aktron de ensemblo . . .”

Sango fluis al mia vizaĝo kaj forte pulsadis ĉe la tempioj. Mi sentis bedaŭron pro Yamei, tamen mi ne povis trovi elokventajn argumentojn kaj ekzemplojn por ŝin persvadi, mi povis nur rekte deklari al ŝi: “Mi komprenas lin. Li kaŝis nenion de mi. Mi amas lin. Ĉu vi scias, Yamei? Mi ne amikiĝis por edziniĝo, mi enamiĝis . . . Amo, ĉu vi komprenas ĝin?”

Yamei abrupte haltis, ellasis mian brakon kaj gape rigardadis min. Ho jes, certe ŝi miris, kial mi, grupestrino de la Komunisma Junulara Ligo, hodiaŭ publike parolas “amon” senhonte. Por kamaradinoj kiel Yamei, amiko, edzo, geedziĝo, geedziĝa registro . . . estas terminoj leĝaj



kaj neriproĉeblaj, kaj tamen la vorto “amo”, kvankam ne nepre kondamninda kiel fripona slango, portas nuancon de postginteco kaj senhonteco. Oj, ja kiu malebligis al knabinoj kiel Yamei havi decan kaj sanan amon? Ja kiu faris la 28-jaran knabinon, relative diligentan en laboro kaj preskaŭ sendifektan en moralo, tiel triviala kaj inerta?

Kaj tiam mi prenis la brakon de Yamei. Mi sentis, ke mi havas multon por diri al tiu koleginino. Mi diris al ŝi malkaŝe: “Yamei, vi jam diris tre multe pri via karulo . . . Mi tute ne oponas, ke vi havu ŝrankon, sofojn, skribotablon, fotilon kaj aliajn taŭgajn elegantajn objektojn, kiajn ankaŭ ni aĉetos en bonaj ekonomiaj kondiĉoj post nia geedziĝo . . . sed plej gravas la persono mem. Kia homo estas via amiko? Vi malmulte parolis kun mi pri li. Ĉu vi amas lin? Se iu alia havus pli multe da posedaĵoj, ĉu vi povus ankaŭ edziniĝi al li? Ne koleru pro miaj vortoj, Yamei, mi nur esperas, ke vi bone pripensu . . .”

La bona humoro de Yamei neniam ŝanĝiĝas. Ŝi neniam koleriĝis kaj diris al mi sincere: “Se troviĝus iu alia kun pli bonaj kondiĉoj, kompreneble mi ne nepre edziniĝus al li. Tamen, kiu servus kiel mia peranto? Mi estas pli aĝa ol vi kaj ne plu povas atendi . . . Se mi ankoraŭ elektadus, eble mi preterlasus eĉ ankaŭ ĉi tiun. Xiaoyu, ankaŭ vi devus esti iom realisma.”

Mi volis repliki ŝiajn vortojn, kiam ŝi subite ekrigardis al sia brakhorloĝo kun “ho ve” kaj diris al mi kun maltrankvila mieno: “Ni interkonsentis viziti lian kuzinon je la kvina posttagmeze, jen mi preskaŭ malfruiĝis . . .” Je tio ŝi kuris al la aŭtobusa haltejo, kaj ŝi sin turnis al mi survoje kaj min atentigis: “Xiaoyu! Aŭskultu mian admonon, estu iom realisma!”

(Daŭrigota)





# De la “monda firsto” al la norda angulo de la terglobo

— Pri vizito de la Ĉina Tibeta Ensemblo al kvin landoj de norda Eŭropo

de HUANG SIXIAN

**F**ORPASIS jam duonjaro post la vizito de la Ĉina Tibeta Ensemblo al kvin landoj de norda Eŭropo. Ĉiufoje kiam mi ekpensas pri la varma akcepto kaj sincera amikeco de la popolo de norda Eŭropo al la ĉina popolo, longe emociiĝas mia koro.

## SINCERA AMIKECO

De aŭgusto ĝis oktobro de 1978, la Tibeta Ensemblo, kiel reprezen-

tanto de la miliono da liberigitaj servutuloj de Tibeto faris turneon al 26 urboj de Svedio, Finnlando, Norvegio, Danlando kaj Islando laŭ invito. Ĝi estas la unua ĉina nacimalplimulta ensemblo, kiu faris viziton al norda Eŭropo, kaj trapasis tie neforgeseblajn tagojn kaj noktojn en maro de ĝojo kaj amikeco.

En Svedio la ĉinaj gastoj vizitis iun elementan lernejon. Kiam ili

venis en iun klasĉambron de la kvara klaso, la geknaboj estis sin ekzercantaj en pentrado. Iu 10-jara lernanto donacis sian pentraĵon al iu onklo de la ensemblo. Sur la pentraĵo flirtas en sunbrilo la kvinstela ruĝa flago. La pentraĵo spegulas amikan senton de sveda infano al la ĉina popolo.

Tibeto kaj Norvegio distancas je dekmil kilometroj kaj havas malsamajn lingvojn kaj morojn, sed ilin

*Gastado en la hejmo de sveda amiko*





*Post prezentado en Oslo, la estro de la ensemblo amike manpremas kun la ministro de edukaj kaj religiaj aferoj de Norvegio.*



*La ensemblo sin amuzas kun danaj geamikoj.*

firme ligas amikeco. Dum prezentado de la ensemblo en urbo Tromsø de Norvegio, la loka filio de la Norvega-Ĉina Amikeca Asocio donacis al ĝi ŝalmon. Por esprimi amikan sentimenton de la ĉina popolo al la norvega popolo, ĉinaj aktoroj decidis ludi norvegan arion per la ŝalmo. Sciinte tion, iu norvega amiko tre ĝojis kaj samvespere fervore kaj pacience instruis tibetan ŝalmsoliston Sedain pri manipulado de la ŝalmo. En la sekvinta tago, kiam Sedain lerte ludis norvegan arion per la ŝalmo, la spektatoroj longe kaj varmege manklakadis pro la amika gesto.

Islanda blindulo A. Helgason estas malnova amiko de la ĉina popolo. Kvankam li perdis la vidpovon, tamen li ĉiam senlace laboras por plifortigi la amikecon inter Islando kaj Ĉinio. Post kiam la ensemblo atingis Islandon, li tre entuziasme akompanis ĝin al diversaj lokoj por viziti kaj prezenti. Survoje li prezentis al la ĉinaj amikoj la historion kaj kulturon de Is-

lando kaj ĝoje kantis kantojn de Islando kaj Ĉinio kune kun la ĉinaj aktoroj. Li diris: “Mi estas amatoro de muziko. Mi ekkonis Ĉinion per ĉina muziko. Nun mi ankoraŭ tenas hejme multajn ĉinajn sondiskojn kaj muzikajn verkojn.” Li esperis, ke li havos ŝancon viziti Tibeton en la estonteco.

#### **LA HODIAŬA TIBETO ESTAS BELA LOKO**

Dum sia turneo, la ensemblo prezentis dancojn pri la bela pejzaĝo de la Tibeta Altebenajo kaj la feliĉo kaj ĝojo de la liberigitaj servutuloj kaj tibetajn popolkantojn. La nord-eŭropaj popolanoj ne nur varme laŭdis la prezentadon de la ensemblo, sed ankaŭ kun tre granda intereso petis informojn pri la pasinteco kaj estanteco de Tibeto kaj sentis ĝojon pro la progreso de la hodiaŭa Tibeto.

En finlanda ĵurnalo, iu amiko skribis, ke la turneo de la ensemblo kvazaŭ varma vento el Tibeto al-

portis al la finlanda popolo kulturon de longa historio kaj aparta stilo, kaj havigis al la spektatoroj gravan kaj neforgeseblan travivaĵon. Iu norvega amiko diris: “La vizito de la ensemblo ne nur vidigis al mi riĉajn tibetajn kulturon kaj arton, sed ankaŭ konigis al mi la mallumon de la malnova Tibeto kaj ĝian grandan ŝanĝigon post la renverso de la reakcia regado de la servutulaj mastroj.” Kiam la ensemblo estis forlasonta Danlandon, iu dana amiko nomata Davidson improvizis poemon kaj donacis ĝin al la ensemblo. En la poemo li skribis: “Via bela muziko kvazaŭ zefiro trapasanta kvietan maron, kunportis paradizan Tibeton al la mondo, kaj absorbite ni aŭskultis la himnon el Tibeto pri la vivo. . .” Tio ne estas ordinara poemo, ĉiu el ĝiaj versoj plenas je amika sentimento inter la dana kaj ĉina popoloj.

Je la adiaŭo iu islanda amiko faris sinceran kaj amikan interparolon kun ĉinaj aktoroj. Antaŭ dek-





*La mastro verŝas kuleron da malvarma akvo al la nuko de ĉiu membro, laŭ sia nacia moro.*

kelkaj jaroj, kiam li ankoraŭ estis mezlerneĵano kaj iu pastro foje parolis en leciono pri la problemo de Tibeto. La pastro beligis la tibetajn servutulajn mastrojn kaj kalumniis la liberigon kaj demokratian reformon de Tibeto kiel detruon de religio kaj kulturo laŭ propagando de okcidentaj ĵurnaloj. Tiam li ekkredis la mensogon. Poste dank' al kontaktado kun ĉinaj amikoj, precipe post lia vizito al Ĉinio, li pli bone konis Tibeton. Li diris: "Ĉi foje mi ekhavis ŝancon interparoli kun multaj tibetaj artistoj kaj tio havigis al mi pli bonan konon pri Tibeto. Antaŭ kelkaj tagoj, mi denove renkontis la pastron kaj mi diris al li, ke lia aserto pri Tibeto estas falsa."

Antaŭvespere de la forlaso de la ensemblo al Svedio, iu sveda amiko diris: "Antaŭ via vizito, ni svedoj sentis ke Tibeto estas tre malproksima kaj fremda por ni, sed post via vizito, multaj svedoj sentas ke Tibeto multe proksimiĝis al ili." Jes, la turneo ne nur ebligis kul-

turan interŝanĝon, sed ankaŭ pliiĝis la interkomprenon.

### RENKONTIĜO KUN SAMI-OJ

En la norda limregiono de Finnlando, Norvegio kaj Svedio disloĝas pli ol 50,000 sami-oj. Ili estas nacimalplimulto de norda Eŭropo kun kompare multaj membroj. Ili montris apartan entuziasmon pro la vizito de la nacimalplimulta ensemblo el Ĉinio.

Kiam la ensemblo venis al Rovaniemi de norda parto de Finnlando, tieaj sami-aj reprezentantoj okazigis bonvenigan ceremonion kun originala nacia stilo ĉe la limo de la arka regiono kaj donis al ĉiu membro atestilon pri eniro de la arka cirklo. Laŭ tradicia nacia kutimo, la mastro devas verŝi kuleron da malvarma akvo al la nuko de ĉiuj membroj laŭvice. Jam estis malvarma septembro, sed en la varmega atmosfero de ĝoja renkontiĝo de la nacimalplimultaj reprezentantoj de la du landoj, la aktoroj de laensem-

blo ne sentis malvarmon, sed fratan varmecon. Kiam la ceremonio finiĝis, sami-a reprezentanto diris: "Tia ceremonio okazas nur inter parencoj, nun ni povas diri ke ni estas samfamilianoj."

En urbo Tromso de Norvegio, la aktoroj de la ensemblo kaj reprezentantoj de la tutlanda kaj tiea sami-aj federacioj kune okazigis amikan renkontiĝon kaj kore interparolis. La sami-aj reprezentantoj demandis pri la pasinteco kaj estanteco de Tibeto, laŭdis atingojn en diversaj flankoj post la liberiĝo de Tibeto kaj la nacian egalecon ĝustan de la tibetanoj kaj aliaj nacimalplimultoj en Ĉinio. Tiu renkontiĝo postlasis al la aktoroj de la ensemblo neforgeseblan impreson.

La ĉ. du-monata vizito finiĝis. La profunda amikeco de la nordeŭropa popolo al la ĉina popolo estas tre kortuŝa. Tiu amikeco seninterrompe fluos kiel "ora akvofalo" de Islando kaj la rivero Yarlung Zambo de Tibeto.



# La Movado de la Kvara de Majo

de SHANG MINGXUAN

**E**N la 4-a de majo, 1919 okazis granda manifestacio antaŭ Tian-anmen-pordego de Beijing (Pekino). Alte tenante la standardon kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo, la ĉina popolo disvolvis batalon kontraŭ imperiismo kaj ĝia lakeo — la registaro de la nordaj militaristoj. Tiu batalo rapide disvastiĝis al diversaj lokoj kaj fariĝis granda revolucia movado tutlanda. Ĝi estis la Movado de la Kvara de Majo konata en la ĉina historio.

## 1. HISTORIA FONDO

En la 10-a de oktobro, 1911 la revolucio gvidata de la granda demokratia revoluciisto Sun Zhongshan (Sun Jatsen) renversis la lastan feŭdisman dinastion en la ĉina historio kaj finis la aŭtokration de pli ol 2,000 jaroj. Sed la revolucio de 1911 ne sukcesis, ĉar ĝi ne liberigis Ĉinion el la situacio de duonkolonio kaj duonfeŭdismo. Poste, la norda militaristo Yuan Shikai uzurpis la frukton de la revolucio. Por realigi sian sonĝon pri imperiestriĝo, li akceptis 21 sekretajn artikolojn de la japana imperiismo, celantajn pereigi Ĉinion, pro kio la ĉina nacio sin trovis en kriza momento. Post la morto de Yuan Shikai, imperiismaj landoj subtenis respektive lokajn militaristojn, por

turni ilin en agentojn. La ĉina popolo refoje dronis en senlima sufero de sinsekvaj militoj inter la militaristoj.

Guste tiam aperis en Ĉinio du gravaj ŝanĝiĝoj: la ĉina laborista klaso kreskis kun la disvolviĝo de la ĉina kapitalismo kaj leviĝis nova kultura movado kontraŭ feŭdismo.

La Unua Mondmilito de 1914 ĝis 1918 estis krima milito inter imperiismaj landoj por kapti koloniojn. Ĉar la imperiismaj landoj Britio, Francio, Rusio kaj Germanio okupiĝis ĉefe pri la milito kaj provizore moderigis sian agreson al Ĉinio, la nacia kapitalismo de Ĉinio ricevis rapidan disvolviĝon. La tekstila kaj faruna industrioj disvolviĝis plej rapide. De 1914 ĝis 1920, la nombro de laboristoj de la du industrioj kreskis 4-5-oble. Samtempe kun tio, ankaŭ la ĉina laborista klaso disvolviĝis kaj potenciĝis rapide. En 1913 en Ĉinio estis nur 650,000 industriaj laboristoj, sed post la milito jam ĉ. 2,000,000.


Kvankam la ĉina laborista klaso estis ne multenombra, tamen ĝi estis la reprezentanto de la novaj produktaj fortoj de Ĉinio. Same kiel la laborista klaso de ĉiuj aliaj landoj, ĝi ligiĝis kun progresiva ekonomia

formo. Ĝi koncentriĝis en malmultaj grandaj urboj kaj grandaj entreprenoj kaj povis facile formi grandan politikan forton. Tiuj laboristoj devenis plejparte de kamparo kaj havis naturan ligiĝon kun kamparanoj. Pro tio ili povis facile sin alianci kun kamparanoj en batalo. Precipe pro tio, ke la ĉina laboristaro suferis subpremandon de imperiismo, burĝaro kaj feŭdaj fortoj kaj vivis tre mizere, ĝi havis ĝisfundan revolucionan spiriton kaj grandan batalforton.

Post aŭtuno de 1915, la radikalaj revoluciaj demokratoj de Ĉinio komencis novan kulturen movadon kontraŭ feŭdismo. Tiu movado propagandis demokration, sciencan kaj literaturan revolucion kaj forte batis feŭdisman etikon, moralon, patriarkan ideon, kulturon kaj arton, tiamaniere ĝi ludis grandan iluminan rolon al la popolo, precipe al intelektuloj, en politika vekigo, dank' al kio ili sin liberigis el la kateno de malnovaj moraloj kaj pensoj kaj levis ardan tajdon de serĉado de novaj scioj kaj vero.

Vintre de 1917 eksplodis la Oktobra Socialisma Revolucio, kiu skuis la mondon. Ĝi komencis novan eraon de la homa historio, donis tre grandajn inspiron kaj forton al la subpremataj klasoj kaj nacioj de





*La gestudentoj de la tuta Shanghai strikis.*

la mondo kaj montris al ili la ĝustan vojon de liberigo. Antaŭe la ĉinaj progresemuloj iris longan kaj malfacilan vojon por serĉi rimedojn por savi la patrolandon kaj la polon kaj ĉiamaniere klopodis por lerni de la okcidento. La venko de la Oktobra Revolucio alportis esperon al la ĉinaj progresemaj intelektuloj, kiuj vagadis melankolie, helpate de tio ili komencis preni proletan mondkoncepton kiel instrumenton por koni la socion kaj denove konsideri kiun vojon ili devas iri.

Post la revolucio marksismo komencis disvastiĝi en Ĉinio. En oktobro de 1918 intelektuloj kun elementaj komunismaj pensoj fondis marksisman studrondon, kiu aktive

studis marksismon. En novembro Kamarado Li Dazhao publikigis en la gazeto "Nova Junularo" siajn du artikolojn "Venko de Pleboj" kaj "La Venko de Bolŝevismo", kiuj entuziasme prikantis la Oktobran Revolucion kaj propagandis marksismon. Nova Ŝanĝiĝo okazis al la enhavo de la nova kultura movado.

La kreskado kaj grandiĝo de la ĉina laborista klaso, la leviĝo de la nova kultura movado kontraŭ feŭdismo, precipe la influo de la granda Oktobra Revolucio kaj la disvastiĝo de marksismo en Ĉinio montris, ke baldaŭ nepre alvenos revolucia movado gvidata de la ĉina laborista klaso. Ĝuste en tia historia fono la granda Movado de la Kvara de Majo eksplodis kun

la Paca Konferenco de Parizo kiel brulŝnuro.

## 2. LA PROCESO DE LA MOVADO DE LA KVARA DE MAJO

En novembro de 1918 finiĝis la Unua Mondmilito. En januaro de 1919 la milito-gajnintoj Britio, Francio, Usono, Japanio kaj Italio kunvokis "Pacan Konferencon" de Parizo. Ankaŭ Ĉinio, kiel unu el la milito-gajnintoj, sendis al ĝi sian delegacion, kiu prezentis al ĝi sep postulojn, inkluzive de abolo de la eksterlandaj influferoj en, retiro de la eksterlandaj armeoj el kaj redono de la koncesiitaj kvartaloj al Ĉinio. Poste laŭ insista peto de la ĉinaj studentoj en Eŭropo, la delegacio aldone prezentis al ĝi postulon de



*Studento de Beijing faras paroladon surstrate en la Movado de la 4-a de Majo.*

nuligo de la “21 artikoloj” truditaj de la japana imperiismo al Ĉinio. Sed la Paca Konferenco de Parizo rifuzis diskutadon pri tiuj problemoj, pretekstante, ke ili estas ekster la rajtoj de la konferenco. Poste la ĉina delegacio postulis rekte repreni la koncesiojn de Germanio en Shandong antaŭ la milito (inkluzive de la koncesiita teritorio Jiaozhou kaj la fervojo Qindao-Jinan-a kaj aliaj). Ankaŭ tiu lasta postulo estis rifuzita. Britio, Francio, Usono kaj Italio eĉ devigis Ĉinion transdoni al Japanio la rajtojn perforte akiritajn de Germanio en Shandong.

Tio komplete malkaŝis, ke la Paca Konferenco de Parizo estis kunveno por denove dividi la mondon, kaj elrevigis la ĉinan popolon. En la 30-a de aprilo, kiam la artikoloj pri la Shandong-a problemo de Ĉinio en la Paca Traktato estis difinitaj, tio tuj forte indignigis la ĉinan popolon kaj nova patriota movado kontraŭ imperiismo eksplodis kiel vulkano.

En la 3-a de majo diversaj rondoj de Beijing okazigis protestajn kunvenojn. En la nokto de la sama tago reprezentantoj de la altaj lernejoj de Beijing kaj studentoj de Beijing-universitato okazigis urĝan kunvenon en la halo de la jura fakultato de Beijing-universitato. La kunvenantoj tre indigniĝis, multaj el ili proponis puni projapanajn naciperfidulojn Cao Rulin, Zhang Zongxiang kaj Lu Zongyu kaj unuanime decidis manifestacii en la sekvanta tago.


Je la unua posttagmeze de la 4-a de majo, pli ol 3,000 studentoj de 14 altaj lernejoj de Beijing kolektiĝis antaŭ Tian-anmen-pordego kaj okazigis patriotan mitingon, spite de minacado de la norda militarista registaro kaj deadmono kaj malhelpo de la aŭtoritatoj de la lernejoj. Ili alte tenis flagojn surhavantajn jenajn vortojn “Nuligu la 21 artikolojn”, “Reprenu Qingdao”, kaj kriis sloganojn “Defendu la ŝtatan suverenecon kaj punu la naciperfidulojn”, “Redonu al ni Shandong”

kaj “Rifuzu surskribon sur la Paca Traktato”. En la kunveno senĉese aŭdiĝis laŭta kantado kaj indignaj sloganoj. Post la mitingo la partoprenantoj faris manifestacion. Kiam la manifestaciantoj atingis la buŝon de la strato Dongjiaominxiang kie lokiĝis multaj fremdlandaj ambasadorejoj, fremdlandaj policanoj, reakciaj armeanoj kaj policanoj de la norda militarista registaro ne permesis al ili trapason. La fakto, ke ĉinoj ne havis liberon de trapaso eĉ sur sia propra teritorio, pliindignigis la studentojn. Ili decidis iri rekte al la domo de la naciperfidulo Cao Rulin en la orienta kvartalo.

La studentoj brave entrudiĝis en la domon de Cao multe gardatan de armeanoj. Ili ne trovis Cao Rulin, kiu forfuĝis, sed trovis Zhang Zongxiang kaŝitan en la domo de Cao. Ili solide batis la kaptitan perfidulon kaj indigne forbruligis la domon de Cao.

La registaro de la nordaj militaristoj aplikis fortan subpremon al





*La Nacisava Rondo de Orient-Sichuan-aj Lernantoj en Chongqing manifestacias postulante repreni Qingdao kaj puni la naciperfidulojn.*


*Manifestacia kolono de Beijing-universitato*



la patriota agado de la studentoj. En la 4-a de majo la militarista registaro kalumniis la patriotajn studentojn kiel "ekstremistojn", senskrupule arestis dekojn da studentoj kaj urbanoj partoprenintaj en la manifestacio, dirante ke ili donos al juĝejo la arestitojn. La subpremado de la reaktularo estigis pli fortan indignon de la popolo. Je la 5-a de majo la altaj lernejoj de Beijing faris ĝeneralan strikon, organizis propagandajn grupojn kaj publikigis diversajn presadojn por fari patriotan propagandon. Ankaŭ studentoj de Tianjin (Tiangin), Shanghai (Ŝanhajo), Nanjing (Nankino), Wuhan (Vuhan), Jinan (Ginan), Taiyuan (Tajjuan), Anqing (Anking), Changsha (Ĉangŝa), Guangzhou (Kantono), Fuzhou (Fuĝou) kaj Chongqing (Ĉongking) faris grandajn mitingojn kaj manifestaciojn, responde al la patriota agado de Beijing-aj studentoj. La norda militarista registaro instigata de imperiismaj landoj, precipe de la Japanio, perforte malpermesis al la popolo kunveni, akuzis studentojn, ordonis ke la studentoj reiru al la klasĉambroj, kaj alprenis diversajn artifikojn por ilin dividi kaj delogi.

Ju pli granda estis la premo de la reaktularo, des pli firma estis la rezisto de la popolo. La studentoj senhezite rifuzis la ordonon de la norda militarista registaro. Je la 3-a de junio ĉ. 2000 studentoj de Beijing faris paroladojn surstrate por malkaŝi la naciperfidan krimon de la registaro. En la 4-a de junio duobliĝis la nombro de la studentoj irintaj por fari paroladon. Ili interkonsentis ne retiriĝi eĉ je risko de sia vivo. En du tagoj preskaŭ mil studentoj estis arestitaj, eĉ ne sufiĉis la karceroj por ilin enteni.

Rapide disvastiĝis tra la tuta lando la informo pri la grandskala arestado de studentoj fare de la



*Manifestaciantaj studentoj atakas la loĝejon de naciperfidulo Cao Rulin.*



*Amasa mitingo en Shanghai*

norda militarista registaro. En la grandaj urboj de la lando okazis manifestacioj kaj diversaj kunvenoj. Ankaŭ multaj mezaj kaj malgrandaj urboj, eĉ iuj vilaĝoj estis influitaj de tiu movado. Tiu patriota movado pligrandiĝis kaj ĝia centro moviĝis de Beijing al Shanghai, la plej granda industria kaj komerca urbo de Ĉinio, kaj laboristoj, anstataŭ la studentoj, fariĝis ĝia ĉefa forto.

Je la 5-a de junio laboristoj de Shanghai komencis fari grandskalan strikon, kaj inspirate de studentoj kaj subtenate de laboristoj, ankaŭ la Shanghai-aj komercistoj ĉesigis sian negocan aktivadon. En la 10-a la striko formis altan tajdon, la nombro de la strikantoj de diversaj rondoj atingis pli ol 60,000. Ĉiuj ŝipoj ĉu ĉinaj aŭ alilandaj, kaj ĉiuj trajnoj ĉesis funkcii. Ankaŭ la fer-



vojistoj de Changxindian kaj Tangshan, jinrikŝistoj de Tianjin, laboristoj de Hangzhou (Hangĝou), Jinan kaj aliaj lokoj faris strikon. Ĝi estis la unua politika striko de ĉinaj laboristoj en la ĉina historio kaj donis tre grandan baton al imperiismo kaj la reakcia reganta klaso.

La norda militarista registaro devigite akceptis la postulojn de la popolo, liberigis la arestitajn studentojn kaj eksigis la tri naciperfidulojn Cao, Zhang kaj Lu el iliaj oficoj en la 10-a de junio. Sed la patriota movado de la popolamasoj ne finiĝis kaj turniĝis en batalon kontraŭ subskribo de la Paca Traktato. Popolamasoj en diversaj lokoj okazigis kunvenon kaj sendis reprezentantojn al Beijing por peti la registaron rifuzi la subskribon. Ankaŭ leteroj kaj telegramoj pri tio estis senĉese senditaj al Beijing kaj Parizo. En la 28-a de junio, dato de subskribo de la Paca Traktato, ĉinaj laboristoj kaj studentoj en Parizo sieĝis la loĝejon de la ĉina delegacio, tiel ke ĝi ne kuraĝis subskribi sur la Paca Traktato. La patriota Movado de la Kvara de Majo gajnis unuapaŝan venkon.

Samtempe kun la disvolviĝo de la patriota movado, plie progresis ankaŭ la nova kultura movado. En la Movado de la Kvara de Majo aperis multaj ĵurnaloj kaj gazetoj tra la tuta lando por propagandi kontraŭimperiisman kaj kontraŭfeŭdisman penson kaj marksismon. Tiutempe, Kamarado Mao Zedong gvidis en Hunan la revolucian batalon. Post eksplodo de la Movado de la Kvara de Majo, li fondis la Studentan Union kaj Diversrondan Union de Hunan kun la membroj de la Xinmin-a Asocio kiel ilia ĉeforto kaj gvidis la ardan batalon de studentoj, instruistoj kaj aliaj rondoj. En julio de 1919 li eldonis en Changsha gazeton "La Revuo Xiangjiang" kaj publikigis sian gra-

van artikolon "La Granda Unuiĝo de la Popolamasoj". En septembro li organizis studentojn de Hunan, alianciĝante kun personoj de eduko kaj ĵurnalismo, en batalo por forpeli la lakeon de la nordaj militaristoj en Hunan Zhang Jingyao. Tiam Kamarado Mao Zedong jam kombinis marksismon kun la ĉina praktika revolucia batalo.

### 3. LA HISTORIA SIGNIFO DE LA MOVADO DE LA KVARA DE MAJO

Tiu movado estis epokfara revolucia movado kaj turnopunkto de la malnov-demokratia revolucio al la nov-demokratia revolucio de Ĉinio. Ekde tiam la demokratia revolucio de Ĉinio fariĝis nov-demokratia revolucio sub la gvido de la ĉina laborista klaso. La Movado de la Kvara de Majo manifestis la altan patriotismon kaj fortan batalvolon de la ĉina popolo por naciaj sen-

dependeco kaj emancipo. Tiu movado okazinta sub la influo de la rusa revolucio ligis la ĉinan revolucion kaj la proletan revolucion de la mondo kaj fariĝis konsistiga parto de la siatempa proleta socialisma revolucio de la mondo.

Kvankam tiam ankoraŭ ne estis politika partio de la ĉina laborista klaso, tamen jam estis intelektuloj kun elementaj komunismaj pensoj. Ili propagandis marksismon en Ĉinio kaj ludis kernan rolon en la revolucia movado. La movado ebligis al la ĉina laborista klaso ascendi la politikan scenejon. La striko de laboristoj estis decida faktoro por la venko de la patriota movado.

Post la Movado de la Kvara de Majo, en la 1-a de julio, 1921, naskiĝis la Komunista Partio de Ĉinio. De tiam tute noviĝis la fizionomio de la ĉina revolucio.

*Speciala numero pri marksismo de la gazeto "Nova Junularo" eldonita en majo de 1919.*



# Kiu Estas Mastro de la Domo

(Popola rakonto de Kamboĝo)

Ilustrita de Yin Fengge



Iu konstruis por si domon. Venis al li fremda viro kaj petis permeson de la mastro por tranokti en la domo. Sed anstataŭ unu nokton li loĝadis tie tutan monaton, dum kiu li kaŝe kalkulis la laborojn, la tabulojn de la planko kaj la tegolojn sur la tegmento de la domo. Poste li diris al la mastro: “La domo estas mia, bonvolu eliri el ĝi.” Ili disputadis, ne cedis unu al la

alia kaj iris al juĝisto. La mastro de la domo diris: “Mi konstruis la domon kaj lasis lin loĝadi en ĝi dum unu monato, sed jen li asertas ke la domo estas lia.”

La viro diris: “Li mensongas. Estas mi, kiu konstruis la domon kaj lasis lin loĝi tie unu monaton. Se la domo estus lia, do li diru, kiom da laboroj, tabuloj kaj tegoloj la domo havas.”

“Mi neniam kalkulis, tamen la domo estas mia!” diris la mastro.

La juĝisto demandis la tranoktanton: “Ĉu vi scias la nombrojn?”

Tiu de longe jam bone memoris la nombrojn kaj tuj eldiris ilin.

Aŭskultinte lian respondon, la juĝisto pensis en si: “Se li scias tiujn nombrojn, li certe estas la mastro de la domo.” Kaj li aljuĝis la domon al la viro. Sed la mastro ne akceptis la decidon kaj iris kun la viro al la reĝo.

Aŭskultinte la argumentojn de ambaŭ alvenintoj, la reĝo demandis la viron: “Se vi povas ĝuste diri la nombrojn de la laboroj, tabuloj kaj tegoloj de la domo, do vi diru al mi, kio estas sub la kolonoj?”

“Nenio!” respondis la viro.

Tiam la mastro diris: “Pro humideco de la grundo en la sudorienta angulo de la domo mi enbatis lignajn palisetojn sub la kolono en tiu flanko.”

La reĝo sendis por enketa kaj konstatis, ke la mastro diris veron. Li redonigis la domon al la mastro kaj punis la friponon.





## NIGRAKOLA GRUO

Nigrakola gruo estas unu el la raraj animaloj en la mondo. Laŭ akiritaj informoj, tiu speco de gruoj vivas nur en la Qinghai (Kinghaj)-Tibeta Altebenaĵo, krom malmultaj en orienta parto de Kaŝmiro. Ilia vivmedio estas stepaj aŭ fragmitaj marĉejoj ĉirkaŭataj de montoj je 3,000-4,000 metroj super la mara nivelo. Printempe ili are alflugas de sudo kaj dise loĝas pare en malprofundaj akvoj. Ili ne havas fiksitajn loĝejojn, konstruas nestojn sur herbobenkoj ĉirkaŭataj de akvo en centro de marĉejo nur en la periodo de ovodemetado de la meza tagdeko de majo ĝis la unua tagdeko de junio. Ĉiujare ĝi demetas du ovojn helbrunajn kun multaj okraj kaj nigraj makuloj. Ĉiu ovo pezas je 245-250 gramoj. La kovadon plenumas la vira kaj ina gruoj alterne kaj post ĉirkaŭ 30 tagoj eloviĝas gruido, kiu post du aŭ tri tagoj povas piediri, vadi en akvo kaj mem akiri nutraĵon, kaj post tri aŭ kvar monatoj sendepende vivi, fariĝinte same granda kiel la gepatroj.

La birdo ofte ĉasas fiŝojn, insektojn kaj batracojn en malprofun-



daĵoj kaj ankaŭ sin nutras per akvoherbidoj kaj herbosemoj.

Plenkreska gruo pezas je ĉirkaŭ 6 kilogramoj kaj altas je pli ol 1 metro. Samkoloraj estas la plumoj de la vira kaj ina gruoj: ilia korpo estas griza, iliaj flugiloj nigraj, la beko, la kolo kaj la ergotoj longaj, la haŭto sur la nuda verto ruĝa kaj la vangoj kaj la kolo nigraj, kaj pro tio ĝi ricevis la nomon nigrakola gruo.

Ĝi estas zorge protektata de la ŝtato, kaj natura protektejo estas difinita por ĝi.

Nun niaj sciencistoj planas fari observadon en difinitaj lokoj por plipaŝe koni la vivkutimojn de tiaj gruoj, ilian nombron kaj la leĝon de ilia migrado kaj komencis skribi "Enketan Raporton pri Dislokiĝo de Nigrakolaj Gruoj en Qinghai-provinco".

## DIVENADO PRI PILKOJ

Estas tri kestoj tute similaj unu al alia. En unu el ili estas du nigraj pilkoj, en alia unu nigra kaj unu blanka kaj en la tria du blankaj. Sur la kovriloj de la tri kestoj gluiĝas po etiketo kun surskribo "du nigraj", "du blankaj" aŭ "nigra kaj blanka", nekonforme al la enhavo en la kestoj. Nun elprenu

unu pilkon el unu el la kestoj, sed ne rigardu la alian pilkon en la kesto, por diveni, kiaj pilkoj estas en la tri kestoj. Bonvolu pripensi, el kiu kesto vi devas preni unu pilkon. (Respondon trovu en numero 6.)

(La solvoj de la enigmoj de numero 3: mapo, okulvitroj)


## Fama ĉina esperantisto Venlo Fon forpasis

K-do Venlo Fon, fama esperantisto kaj membro de la konstanta konsilantaro de la Ĉina Esperanto-Ligo, forpasis je la kvina de februaro, 1979, en Beijing (Pekino) pro malsano, en la aĝo de 79 jaroj. Je la 4-a de aprilo okazis la funebra kunveno en Beijing, kiun ĉeestis respondeculoj de la Ĉina Demokratia Ligo, la Administracia Buroo de la Fremdlingva Eldonado kaj Distribuado, la Fremdlingva Eldonejo, la Ĉina Esperanto-Ligo kaj la redakcio de El Popola Ĉinio, kaj esperantistoj en Beijing.

Frue en 1934 Venlo Fon jam komencis lerni Esperanton. En la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito li sin okupis pri instruado de Esperanto, ofte publikigis artikolojn pri la ĉina rezistmilito kaj vivo de

la ĉina popolo en tiutempa Esperanta gazeto "Heroldo de Ĉinio". Post la Liberiĝo, li laboris kun ankoraŭ pli granda entuziasmo. Li iam funkciis kiel estro de la Esperanta sekcio de la Internacia Novaja Buroo de nia lando, kumulanta la ĉefredaktoron de El Popola Ĉinio, kaj poste redaktoro de la Fremdlingva Eldonejo. En siaj lastaj jaroj li okupiĝis pri Esperanta tradukado de "Elektitaj Verkoj de Mao Zedong" kaj aliaj libroj. Li akumulis riĉajn spertojn en la multjara instruado de Esperanto, kaj liaj lernantoj sin trovas en diversaj lokoj de Ĉinio.


En la pasintaj dekoj da jaroj, kun amo al la Komunista Partio de Ĉinio, li laboris ĉiam diligente kaj fine fariĝis membro de KPC en 1973. Liaj ĉefaj verkoj estas "Plena Vortaro Esperanta-Ĉina", "Esperanta Gramatiko" kaj "Elementa Kurso de Esperanto" k. a.



## Fremdlandaj Esperantaj kantoj en Ĉinio

Post publikigo de du artikoloj pri Esperanto en la Popola Ĵurnalo (*Remin Ribao*), la Centra Popola Radio dufoje, en februaro kaj marto, disaŭdigis Esperantajn kantojn de svisa kantisto Olivier Tzaut, inkluzive de "Voĉe de Gitaro Mia" (Meksika), "Dancu, Dancu" (Slovaka), "Malproksime sur la Monto" (Perua), "Buklo, Buklo" (Cigana Rusio), "Dekses Tunoj" (Usona k.a., la sondisko de tiuj kantoj estis donacita de la kantisto. Antaŭ la disaŭdigo de la kantoj, oni koncize konigis al la ĉinaj aŭskultantoj Esperanton. La disaŭdigo de la kantoj interesis multajn aŭskultantojn, kaj ili skribis al la Centra Popola Radio por peti lernolibron de Esperanto. Ankaŭ Radio Pekino disaŭdigis tiujn kantojn.

En februaro de la kuranta jaro, Esperanto estis prezentita de la Centra Popola Radio ankaŭ en sia programo "Tra la Mondo".







## NOVAJ FABRIKOJ KAJ MINEJOJ EN BEIJING

Nombro da novaj fabrikoj de metalurgio, elektro, kemio, konstruaj materialoj, maŝinoj, tekstilo, kemia sterko kaj malpeza industrio kaj minejoj estas finkonstruitaj en Beijing (Pekino) kaj komencis produktadi. Laŭ nekompleta statistiko, ili povas liveri ĉiujare 2,000,000 tunojn da fera erco, dizelojn de 300,000 ĉevalpovoj, 100,000 tunojn da benzeno, 11,000 tunojn da sinteza amoniako, 9,500,000 kvadratajn metrojn da plasta tapeto, 50,000 kudromaŝinojn kaj 90 tunojn da poliesteraj longaj fibroj.

## TEKNIKA REFORMO AL LA CHENGDU-CHONGQING-A FERVOJO

Nun rapide iras elektrizado al la Chengdu-Chongqing-a Fervojo tra la Sichuan-a Baseno en sudokcidenta Ĉinio. Ĝi estas unu el la kvar fervojoj elektrizataj en nia lando. La aliaj tri linioj estas la Shijiazhuang-Taiyuan-a, Baoji-Tianshui-a kaj Xiangfan-Ankang-a.

Nun, la parto de Chengdu ĝis Ziyang kun longeco de 122 kilometroj jam estas fundamente reformita. En la jaro 1981, la tuta linio kun longeco de 505 kilometroj estos elektrizita.

## MALFERMIĜO DE LA CENTRA TELEVIDA UNIVERSITATO

En la komenco de februaro, malfermiĝis la Centra Televida Universitato fondita kune de la Ministerio de Edukado kaj la Centra Buroo de Radiodisaŭdigo. Ĝi servas al la tuta lando kaj akceptis ĉ. 200,000 studentojn, inter kiuj troviĝas kadroj, oficistoj, laboristoj, mezlernejaj instruistoj, intelektaj junuloj kaj soldatoj de la Ĉina Popola Liberriga Armeo.

Laŭ la instrua plano, la unua periodo de tiu universitato daŭros 3 jarojn. En la unua semestro, oni instruos altan matematikon, kemion kaj la anglan lingvon, kaj poste oni aldonos aliajn lernobjektojn de sciencoj kaj inĝenierado. La instruado estas plenumata de altlernejaj instruistoj. Post ellerno de la difinitaj lernobjektoj kaj gajninte sufiĉajn poentojn, la studentoj ricevos diplomon kaj estos rekonataj de la ŝtato kiel altlernejaj diplomitoj.

## ESPLORA CENTRALO DE ALTEBENAĴAJ KORMALSANOJ

En la urbo Xining (Hining) sur la Qinghai-Tibeta Altebenajo de nia lando, fondiĝis centralo por kuraci korajn kaj vaskulajn malsanojn de altebenajo, nome la Qinghai-a Instituto pri Altebenajoj Kormalsanoj.

Qinghai-provinco plejparte situas je alteco de 3,000 metroj super la mara nivelo. Pro la alteco, frosto kaj nesufiĉeco de oksigeno en la aero de tiu regiono multaj homoj suferas korajn kaj vaskulajn malsanojn.

Tiu instituto konsistas el 6 fakoj, kiuj esploras kaj kuracos la menciitajn malsanojn per terapioj de la ĉina kaj okcidenta medicinoj en kombino.

## VALOREGA ASTRONOMIA MAPO EN ANTIKVA TOMBO

Astronomia mapo en antikva tombo konstruita antaŭ pli ol mil jaroj, en la fina periodo de Tang-dinastio, estas trovita antaŭ nelonge en Lin'an de Zhejiang-provinco. Ĝi estas pentrita sur plafono de la malantaŭa ĉambro de la tombo. Sur ĝi troviĝas pli ol cent steloj de 28 konstelacioj. La steloj el ora lameno de ĉiu konstelacio estas lititaj per rektaj strekoj. Sur muroj de la malantaŭa ĉambro estas pentritaj respektive suno kaj luno. La suno estas ruĝa kaj la luno blanka. Laŭ ekspertizo, la pozicioj de la steloj sur la mapo estas relative ĝustaj, tial la mapo estas utila por astronomia studo.

## SERIOJ DE LIBROJ PRI NACIMALPLIMULTOJ ELDONOTAJ

En la periodo de 1979 ĝis 1981, nia lando eldonos kvin seriojn de libroj pri naciaj problemoj inkluzive de "Ĉinaj Nacimalplimulto" kaj "Historio de Ĉinaj Nacimalplimulto". Ĉinio estas lando kun multaj naciecoj. Unuafoje post la Liberiĝo oni redaktas sisteme tiajn seriojn pri nacimalplimulto.

En la komenca periodo post la Liberiĝo, centraj kaj lokaj institucioj jam komencis kolekti kaj ordigi koncernajn materialojn. De 1956 ĝis 1964, 16 enketaj grupoj estis organizitaj, kiuj faris grandskalan enketadon kaj kolektis materialojn de centoj da milionoj da ideografiaĵoj.


## AKCEPTEJOJ POR TAIWAN-AJ FIŜISTOJ EN FUJIAN

En la lastaj jaroj, maraj fiŝhavejoj de Fujian (Fugian) akceptis 232 Taiwan (Tajvan)-ajn fiŝistajn

ŝipojn kun miloj da homoj, kiuj petis helpon pro ventego aŭ mara katastrofo.

La Taiwan-a Markolo estas unu el la ĉefaj fiŝejoj en la sudorienta maro de nia lando. Ĉiujare, Taiwan-aj fiŝistoj venas tien por fiŝado. Kiam iliaj ŝipoj trafis paneon de motoro aŭ ventegon, ili devis ankriĝi ĉe marbordo de Fujian. En la pasinta jaro, la provinca revolucia komitato decidis fondi akcepteojn por Taiwan-aj fiŝistoj ĉe kvar fiŝhavenoj, al kiuj specialaj laborantoj kaj veturiloj estis instalitaj kaj specialaj domoj konstruitaj, por ke la helpopetantaj Taiwan-aj fiŝistoj pasigu sian tempon facile kaj oportune dum sia restado sur la kontinento.

### MEMORIGO PRI LA CENTJARA DATREVENO DE LA NASKIĜTAGO DE ALBERT EINSTEIN



Memoriga poŝtmarko pri la centjara datreveno de la naskiĝtago de Albert Einstein

La 20-an de februaro, pli ol mil sciencaj laborantoj kunvenis en Beijing (Pekino) por memorigi la centjaran datrevenon de la naskiĝtago (la 14-a de marto) de la granda sciencisto Albert Einstein. Tiu kunveno estis aranĝita de la Ĉina Scienca kaj Teknologia Ligo, la Ĉina Fizika Asocio kaj la Ĉina Astronomia Federacio. En la 21-a

kaj 22-a, okazis kunvenoj de raportoj pri sciencaj atingoj de A. Einstein.

Krome, ankaŭ la Shanghai-a (Ŝanhaja) Instituto de Natura Dialektiko okazigis kunvenon por fari raportojn, kaj la Shanghai-a Scienca kaj Teknika Eldonejo eldonis la libron "Ĉinigitaj Artikoloj Memore al A. Einstein".

### INSTITUTO PRI OKCIDENTEŬROPA EKONOMIO FONDITA EN ĈINIO

En februaro, fondiĝis en Shanghai Instituto pri Okcidenteŭropa Ekonomio. Ĝi celas antaŭenpuŝi la studadon pri la ekzistanta stato kaj historio de la okcidenteŭropa ekonomio kaj pri pensoj kaj politikoj de tiea ekonomio, kaj dank' al tio plibonigi nian lernadon pri eksterlandaj spertoj kaj rapidigi la modernigon de niaj industrio, agrikulturo, nacidefendo kaj scienco kaj teknikoj.

En la inaŭgura kunveno de la instituto, delegitoj de diversaj lokoj de nia lando aŭskultis raportojn pri la okcidenteŭropa ekonomio kaj esplora vojaĝo pri tiu mondparto kaj interŝanĝis opiniojn pri sciencaj studoj.

### LA UNUAJ USONAJ STUDENTOJ EN ĈINIO

En la lasta tagdeko de februaro, 8 usonaj studentoj venis al Ĉinio por daŭrigi sian lernadon kaj estis varme akceptitaj de ĉinaj instruistoj kaj studentoj. Ili studados historion, literaturon kaj la ĉinan lingvon en ĉinaj altaj lernejoj dum unu aŭ du jaroj.

Laŭ interkonsento pri kultura kunlaboro inter Ĉinio kaj Usono subskribita dum la vizito de Vicĉefministro Deng Xiaoping al Usono, pli ol 500 ĉinaj sciencistoj, es-

plorstudentoj kaj studentoj iros al Usono en 1979 por lerni avangardajn sciencojn kaj teknikojn en usonaj altaj lernejoj, kaj pli ol 60 usonaj sciencistoj kaj studentoj venos al Ĉinio por studi la ĉinajn lingvon, historion kaj literaturon.

### NOVA KAJO KONSTRUATA ĈE NINGBO

En januaro de la kuranta jaro, komenciĝis konstruado de kajo por 100,000-tonelaj erco-ŝipoj en la antikva haveno de Ningbo ĉe la bordo de la maro Donghai.

Tiu konstrua objekto inkluzivas viadukton kun longeco de 960 metroj kaj larĝeco de 13 metroj, unu ankrejon por 100,000-tonela ŝipo kaj du ankrejojn por 25,000-tonela ŝipo. Kaj krome, konstruiĝos tie ankaŭ placo sur montdeklivo por teni 500,000 tunojn da fera erco.

Tiu granda kajo por transportado de erco estos regata de komputero kaj la ŝipoj en- kaj elirantaj estos direktataj per radaro.

Parto de la erco bezonata de la konstruata Baoshan-a Fera-Ŝtala Fabriko, kiu troviĝas pli ol 130 marajn mejlojn fore, estos transportata pere de tiu haveno.

### KOLEKTO DE METEOLOGIAJ GRAFIKAĴOJ

Kolekto de meteologiaj grafikajoj de la Ĉina Popola Respubliko estas jam kompilita de la Centra Meteologia Buroo. Tiu verko enhavas materialojn de la periodo de 1951-1970, kolektitajn de ĉ. mil meteorostacioj pri atmosfera premo, sunradiado, sunbrilado, atmosfera temperaturo, humideco, precipita kvanto, ventoj, nuboj, meteaj fenomenoj kaj meteaj regionoj prezentitaj sur 220 grafikajoj presitaj en koloroj. Ĝi estas kolekto de diversflankaj fundamentaj meteografikajoj.



## La “Xi’an-a Evento” Surscenigita

**L**A nomita dramo surscenigita de la Xi’an-a Teatrotropo en Beijing (Pekino) artiste reaperigis, sur scenejo, la faman Xi’an-an Eventon okazintan antaŭ pli ol 40 jaroj en la ĉina historio, kaj relative sukcese figurigis la ĉinajn revoluciajn gvidantojn Mao Zedong (Maŭ Zedong), Zhou Enlai (Ĝoŭ Enlaj) kaj Zhu De (Ĝu De). La prezentado de tiu teatraĵo kun akraj kaj komplikaj konfliktoj ricevis multan laŭdon de la rigardantoj.


### I

En la komenco de la tridekaj jaroj, la japana imperiismo okupis niajn tri nordorientajn provincojn kaj sklavigis la tieajn tridek milionojn da popoloj. En 1935, la japana imperiismo plue invadis nordan Ĉinion. Kien Ĉinio iru en tiu kriza momento de la ĉina nacio? Tio estis demando plej prizorgata de la popolo.

En tiu situacio, la Komunista Partio de Ĉinio estrata de Prezidanto Mao Zedong elmetis la proponon starigi kontraŭjapanan nacian unuecan

fronton, kiu trovis varman subtenon de la tuta popolo kaj personoj de ĉiuj socitavoloj. Sed Jiang Jieshi (Ĉiang Kajŝek), kiu tenis en sia mano la plej altan regpotencon de la ŝtato, elmetis reakcian politikon “por rezisti kontraŭ la eksterlandaj malamikoj, necesas sekurigi unue la internon”, kun deziro nepre ekstermi la Komunistan Partion sen zorgo pri la naciperea danĝero. Por efektivi tiun celon li sendis pli ol tricent mil elitajn soldatojn kaj pli ol cent aviadilojn, persone veturis de Nanjing (Nankino) al Xi’an por supervidi la Kuomintangan armeon en freneza atako al la revolucia bazloko en norda Shaanxi sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio. Impulsate de la kontraŭjapana naciŝava movado de la ĉina popolo kaj influate de la politiko de kontraŭjapana nacia unueca fronto elmetita de la Komunista Partio, tiam Generalo Zhang Xueliang, vickomandanto de la Kuomintang-a armeo por “ekstermi” nordokcidentajn komunistojn, kaj Generalo Yang Hucheng, komandanto de la Xi’an-a Sekuriga Armeo, plurfoje admonis Jiang Jieshi, ke li ĉesigu la enlandan militon por kune rezisti al la

*Vicprezidanto Zhou Enlai intervidiĝas kun diversrondaj reprezentantoj de Xi’an.*





japanaj agresantoj. Jiang ne nur rifuzis iliajn admonojn, sed eĉ pliapaŝe devigis ilin daŭrigi la “ekstermadon de la komunistoj” kaj masakris Xi’an-ajn kontraŭjapanajn gejunulojn. En tia situacio, Zhang kaj Yang arestis Jiang Jieshi en Xi’an je la 12-a de dec., 1936 por ŝanĝi lian politikon. Tio estis konata kiel la mondskua “Xi’an-a Evento”.

Post tiu evento, subite ŝanĝiĝis la situacio. Kvankam la milita plano de Jiang pri atako al norda Shaaxi estis rompita, tamen sub instigado de la japana imperiismo la pro-japana kliko estrata de Wang Jingwei kaj He Yingqin en la Nanjing-a registaro de Jiang Jieshi intencis pereigi Jiang en tiu ŝanco por transpreni lian pozicion, kaj kovis intrigon fari arman punon al Xi’an sub la preteksto savi Jiang Jieshi. Ankaŭ la popolamasoj de ĉiuj rondoj postulis mortigi Jiang pro malkontento pri liaj enlandaj kaj eksterlandaj politikoj. Kvankam la kliko estrata de Song Ziwen, kiu staris por Britio kaj Usono, pledis por “savo per pacaj rimedoj”, tamen ne

povis trovi efikan rimedon en tiama situacio. Vizaĝe al la komplika situacio, ankaŭ Generaloj Zhang kaj Yang forte embarasiĝis.

Tiam, la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio elmetis sian proponon “devigi Jiang rezisti kontraŭ Japanio” kaj pace solvi la “Xi’an-an Eventon”, metante la interesojn de la lando kaj la nacio en la unuan lokon kaj ne kalkulante la venĝindajn krimagojn de Jiang, kaj samtempe sendis Zhou Enlai kiel plenrajtigitan reprezentanton al Xi’an, laŭ invito de Generaloj Zhang kaj Yang. Post interkonsiliĝo kun la du generaloj, Kamarado Zhou Enlai propagandis al la amasoj la politikon “devigi Jiang rezisti kontraŭ Japanio”, sukcese malkonsilis la diversrondajn personojn, kiuj postulis mortigi Jiang, kaj per interparolado devigis lin akcepti la proponon “ĉesigi la enlandan militon kaj kune rezisti kontraŭ Japanio”, kaj tiamaniere pace solvis la “Xi’an-an Eventon”. La paca solvo de tiu problemo alportis gravan influon en kaj eksterlande, kaj aperis nova situacio de kunlaboro inter Kuomintango kaj la Komunista



*Zhang Keyao ludas la rolon de Prezidanto Mao Zedong.*

Partio kaj kuna rezisto kontraŭ la japanaj agresantoj por savi la nacion.

## II

En tiu teatraĵo, Mao Zedong, Zhou Enlai kaj Zhu De de la Komunista Partio kaj Jiang Jieshi,





Zhang Xueliang, Yang Hucheng kaj Song Ziwen de Kuomintango kaj aliaj gravaj personoj, ĉiuj estis reaperigitaj arte sur scenejo laŭ iliaj historiaj lokoj kaj roloj.

Krei arte figurojn de komunistaj gvidantoj estas nova temo en verkado de dramoj de nia lando. En la "Xi'an-a Evento" oni faris kuraĝan praktikon kaj atingis certan sukceson. La spektantoj multe laŭdis la scenon kun Prezidanto Mao Zedong en kaverndomo de norda Shaanxi. La reĝisoro ne prezentis Mao, Zhou kaj Zhu kiel diigitajn politikajn komisarajn, sed prezentis la revoluciajn temperamentojn de la tri gvidantoj kun humuro kaj sprito, manifestante ilian grandecon en detaloj plenaj de vivetoso kaj montrantaj iliajn afablecon kaj facile-alireblecon. Samtempe bone prezentigis ankaŭ la solidareco, reciproka fido kaj prizorgo unu al alia inter tiuj revoluciaj kamaradoj. Ekzemple, la verkisto skribis en la teatraĵo, ke Mao kaj Zhu zorgeme diris al la gardistoj, ke ili bone prizorgu la vivon de Zhou en Xi'an, kaj ke antaŭ sia foriro al Xi'an Zhou balais neĝon antaŭ la



*Liu Falu ludas la rolon de Viceprezidanto Zhou Enlai.*

kaverndomo de Mao, kaj Mao regaligis la du gardistojn per terpomoj. Ĉiuj tiuj vivecaj detaloj impresis la spektantojn per intimeco kaj vekis ĉe ili serenajn ridojn de tempo al tempo.

La dramo emfaze modlis la figuron de Zhou Enlai. Zhou estas unu el la ellaborintoj kaj



*Reĝisoro Wan Ti parolas pri la teatraĵo al la aktoroj.*

efektivigantoj de la politika linio de la Komunisto Partio. La teatraĵo prezentis kun aparta akcento liajn vivstilon kaj talenton de marksisto-politikisto en solvado de la "Xi'an-a Evento". Lia revolucia firmeco kaj fleksebleco estas tre kortuŝa. Ekzemple, li interkonsiligis kun Generaloj Zhang kaj Yang sincere kiel egaluloj, pacience persvadis tiujn kiuj postulis mortigi Jiang, kaj malkaŝis kaj forte riproĉis la projapanulojn kaj trockiistojn. En la sceno de lia intervidiĝo kun Jiang Jieshi, li ne tuŝis la malamikecon en la dekjara enlanda milito, sed montris al Jiang, kun rigardo direktata al la estonto, la interesojn de la lando kaj nacio kaj tiujn de lia persono kaj admonis lin agi laŭ la volo de la popolo, ŝanĝi la eraran politikon kaj iri la vojon de rezisto kontraŭ la japanaj agresantoj. La dramo ankaŭ prezentis la profundan amon de Zhou al la popolamasoj. En iu sceno, Zhou venis en la domaĉon de Maljunulo Wang rifuĝintan el la Nordoriento por vidi lin. Li sidis kun interplektitaj kruroj sur la terlito kaj kore interbabilis kun li, trinkis akvon el lia kruda bovlo, malŝtopis fajron por Wang per ferstangeto, aldonis karbon al lia forno kaj intime interparolis kun grupo da naivaj kaj viglaj junuloj. La talenta ludado de la aktoro vivece reaperigis la elegantan kaj aplomban sintenon, sagacan kaj decideman konduton, trafajn kaj elokventajn argumentojn kaj serenajn ridojn de Zhou. Ĉio ĉi tio firme kaptis la korojn de la spektantoj.

### III

La ludantoj de la gravaj roloj ĉiuj estas mezaĝaj aktoroj. Dank' al diligenta studo, ripeta imitado de kutimaj movoj kaj dialektaj parolma-

nieroj de la roloj, ili sukcese kreis kortuŝajn figurojn.

Foje, dum prezentado, iu komizino iris post la kulisojn por vidi aktoron Liu Falu, kiu ludis la rolon de Zhou Enlai. Kiam Liu venis antaŭ ŝin, ŝi diris emocie rigardante lian aspekton, ke ŝi kvazaŭ revidus Ĉefministron Zhou, kaj eklarmis. Kelkaj instruistoj de iu mezlernejo skribis al la teatrotrupo post rigardo de la dramo, por laŭdi ilian sukcesan kreon de la vivsimila figuro de Zhou Enlai. Ili diris, ke dum rigardado de la teatraĵo ili sentis, kvazaŭ ili revidus Zhou vivantan kaj aŭdus liajn sonorajn parolojn kaj serenajn ridojn.

Fakte ne nur ĉinoj, kun amo kaj estimo al Prezidanto Mao Zedong, Vicprezidanto Zhou Enlai kaj Ĉefkomandanto Zhu De, laŭdis la kreaĵon arton en la dramo "Xi'an-a Evento". Luvespere, kiam la aktoroj estis demetantaj la rolulajn vestojn post finludo de la dramo, iu juna fremdlanda amiko haste ascendis la scenejon kaj petis permeson esti fotita kune kun la roluloj Mao, Zhou kaj Zhu en la dramo por memoro. Li estis pakistana studento, kiu venis al Ĉinio en la pasinta jaro por studado.

En decembro de 1978, japana dramista delegacio vizitis Ĉinion kaj rigardis la teatraĵon "Xi'an-a Evento". Dum kunsido, ili relative alte taksis la teatraĵon kaj elmontris plibonigindajn lokojn. Sinjoro Moronijoji, la estro de la delegacio, diris, ke ĝi fariĝos tre bona verko post iom da revizio, kaj se oni sendos ĉinan teatran trupon al Japanio por prezentado, oni nepre sendu la Xi'an-an Teatrotrupon kiu ludas la dramon "Xi'an-a Evento".



# La Shanghai-a Ĝenerala Petrol-kemia Fabriko


La unuaperioda konstruado de la nomita fabriko jam estis plenumita kaj ĝiaj instalaĵoj jam komencis produktadon. Ĝi estas granda kombinumo, kiu produktas kemiajn fibrojn, plastajojn kaj aliajn kemiaĵojn kun petrolo kiel krudmaterialo. 9 el ĝiaj 18 kompletoj da ekipaĵoj estis importitaj. La teknikistoj kaj laboristoj de la fabriko rapide posedis la importitan teknikon kaj la de ili produktitaj poliesteraĵoj longaj kaj mallongaj fibroj jam atingis la internacian nivelon.

Ekipaĵoj por produkti platan membranon







Ekipajo por trakti malpuran akvon en la fabriko








La Shanghai-a Ĝenerala Petrol-kemia Fabriko



Laborejo de poliestera dika fadeno

En la longfibra laborejo





# Moderna Dramo "Xi-an-a Evento"

Vicprezidanto Zhou Enlai adiaŭas Prezidanton Mao Zedong kaj Ĉefkomandanton Zhu De.



Okaze de la unua datreveno de la Movado de la 9-a de Decembro, diversrondaj amasoj de Xi-an okazigas manifestacion, postulante, ke Jiang Jieshi (Ĉiang Kajsek) ĉesigu la internan militon kaj unuanime batalu kontraŭ la japana imperiismo, kaj pro tio ili estas subpremataj de kuomitnango.








vicprezidanto Zhou  
Enlai varme bonve-  
lita de armeanoj  
popolanoj de  
n.



Vicprezidanto Zhou  
Enlai konsolas fu-  
ĝanton el la Nord-  
oriento.



Vicprezidanto Zhou  
Enlai persvadas Jiang  
Jieshi kaj la lasta  
fine akceptis la pro-  
ponon ĉesigi la in-  
ternan militon kaj  
unuanime batali kon-  
traŭ la japana impe-  
riismo.

Vicprezidanto Zhou  
Enlai propagandas  
politikojn de la Cen-  
tra Komitato de la  
Kompartio al Zhang  
Xueliang (meze) kaj  
Yang Hucheng.



Varma adiaŭo al la  
Okavoja Armeo, kiu  
iras al fronto.

FOTOJ PRI NATU-  
RAJ BELAĴOJ FA-  
RITAJ DE E-ISTOJ

de Kenzen Minami, japana leganto de EPC


Printempo en Kioto







Aũtuno en Kioto



一九七九年五月

